



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

2

1971

Vortoj de Prezidanto Maŭ

**En siaj justaj bataloj,
la diverslandaj popoloj de
la mondo ĉiam subtenas
unuj la aliajn.**

Prezidanto Maŭ Prezidanto



Intervidiĝis kun Yahya Khan



Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto
Yahya Khan varme manpremis.

Je la 13-a de novembro de 1970, Prezidanto Maŭ, la granda gvidanto de la diversaj naciecoj de nia lando, intervidiĝis kun Generalo Agha Mohammad Yahya Khan, Prezidanto de la Islama Respubliko de Pakistano, kaj liaj akompanantoj.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ salutis Prezidanton Yahya Khan kaj la aliajn honorindajn pakistanajn gastojn ĉe la enirejo de la salono, kaj varme manpremis kun ili por bonvenigo.

Poste, Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun la akompanantoj de Prezidanto Yahya Khan, diplomaciaj oficistoj de la pakistana ambasadorejo en Pekino kaj la administra direktoro de Pakistanaj Internaciaj Aerlinioj. La honorindaj pakistanaj gastoj varme manklakis por saluti Prezidanton Maŭ; Prezidanto Maŭ mansvingis al ili en respondo kaj fotiĝis kune kun ili.

Poste, Prezidanto Maŭ havis koran kaj amikan interparolon kun Prezidanto Yahya Khan kaj aliaj honorindaj pakistanaj gastoj. La honorindaj gastoj estas: Leŭtenanto-generalo S. G. M. M. Peerzada, ĉefa staba oficiro de la Prezidanto; M. M. Ahmad, ekonomia konsilisto de la Prezidanto;



Sultan M. Khan, sekretario de eksteraj aferoj; K. M. Kaiser, pakistana ambasadoro al Ĉinio; Syud Ahmad, sekretario de la Ministerio de Informado kaj Naciecaj Aferoj; kaj Tabarak Husain, ĝenerala direktoro de la Ministerio de Fremdlandaj Aferoj; kaj M. A. Jafri, ministro, kaj kolonelo Iftikhar Ahmed Khan, terarmea kaj mararmea ataŝeo de la pakistana ambasadorejo en Ĉinio.

La intervidiĝon kaj la interparolon partoprenis: Dong Bivu, vicprezidanto de la Ĉina Popola Respubliko; Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; Kang Ŝeng, vicĉefkomitatano de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj; Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo; Li Hiannian, vicĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro; kaj Kiu Hujzuo, vicedro de la Ĝenerala Stabo de ĈPLA.

La intervidiĝon ĉestis respondeculoj de koncernaj departementoj Han Nianlong, Li Kiang, Hie Huajde, Juan Huabing, Ma Ĵenhuj, Vang Hajjong, Jang Gongsu, Juan Lulin kaj Han Hju.

Foto farita dum la intervidiĝo






Prezidanto Yahya Khan kaj aliaj pakistanaj honorindaj gastoj akompanataj de Ĉefministro Ĝou Enlaj k.a. intervidiĝas kun la revoluciaj amasoj bonvenigantaj en la aerodromo.



Prezidanto Yahya Khan kaj Ĉefministro Ĝou Enlaj kune veturas per senkovrila aŭtomobilo kaj ricevas varman bonvenigon de popoloj ĉe ambaŭ flankoj de la vojo pli ol 10 liojn longa.



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Prezidanto Yahya Khan faras koran kaj amikan interparoladon.

Prezidanto Yahya Khan donis bankedon kaj liaj akompanantoj ĉeestis ĝin. Laŭ la invito ĝin ĉeestis ankaŭ Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj k.a.



Generalo Agha Mohammad Yahya Khan, Prezidanto de Pakistano, Vizitis Ĉinion

DE la 10-a ĝis la 14-a de novembro 1970, Generalo Agha Mohammad Yahya Khan, prezidanto de Pakistano, faris ŝtatan viziton al la Ĉina Popola Respubliko laŭ la invito de ĝia registaro.

Dum la vizito, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun Generalo Agha Mohammad Yahya Khan, prezidanto de Pakistano, kaj liaj akompanantoj kaj faris kun ili intiman kaj amikan interparoladon.

La pakistana prezidanto kaj liaj akompanantoj ricevis varman bonvenigon kaj grandiozan, entuziasman akcepton de la ĉina registaro kaj ĉina popolo. En tio manifestiĝis la sincera amikeco kaj alta respekto de la ĉina popolo al la pakistana popolo.

En tre sincera kaj amika atmosfero, Ĉefministro Ĝou Enlaj kaj Prezidanto Yahya Khan interparolis pri gravaj internaciaj

problemoj, plia disvolvo de la amikaj kaj kunlaboraj rilatoj inter Ĉinio kaj Pakistano kaj aliaj problemoj kun komuna intereso. Ambaŭ flankoj estis tre kontentaj pri la rezultoj de la interparolado.

En la 14-a de novembro 1970 estis publikigita Komuna Komuniko de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Islama Respubliko de Pakistano.

La komuniko montras ke ambaŭ flankoj plene kontentas pri la profunda kaj plene ampleksa disvolviĝo de la amikaj rilatoj inter Ĉinio kaj Pakistano bazitaj sur la kvin principoj de reciproka respekto de suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto. Ambaŭ flankoj esprimis, ke plia plifortigo kaj disvolvo de la amikaj rilatoj kaj kunlaboro inter Ĉinio kaj Pakistano konformas al la komuna

deziro kaj bazaj interesoj de la du popoloj kaj favoras al la afero de unuiĝo de aziaj kaj afrikaj popoloj kontraŭ imperiismo. Ambaŭ flankoj opiniis ke la strikta sekvado de ambaŭ Ĉinio kaj Pakistano al la kvin principoj de paca kunekzisto estis ekzempligita en la solvado de la landlima problemo inter la du landoj. Tiaj rilatoj inter Ĉinio kaj Pakistano provizis bonan ekzemplon por starigi amikajn rilatojn inter ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj.

La pakistana flanko esprimis profundan dankon al la helpo kaj kunlaboro de Ĉinio al Pakistano kaj varme montris ke la malavara helpo donita de Ĉinio laŭ la vera spirito de reciproka utilo kontribuis en ekonomia disvolvo de Pakistano. La ĉina registaro notis ke nun jam komenciĝis la Kvara Kvinjara Plano de Pakistano kaj esprimis sian volontecon doni plian helpon laŭ la kapablo de Ĉinio por helpi la ekonomion de Pakistano en direkto al sinapogo sur propraj fortoj.

La ĉina flanko varme laŭdis la decidemon kaj kuraĝon, kiujn la pakistana popolo konstante montris por protekti la integrecon de sia lando, kaj ripetis sian firman subtenon al la pakistana popolo en ĝia batalo por defendi la nacian sendependecon kontraŭ agreso deekstere aŭ fremdlanda interveno de ĉiaj formoj, kaj al la kaŝmira popolo en ĝia justa batalo por akiri rajton de memdecido. La ĉina flanko notis kun zorgo la proponon lastatempe elmetitan de la prezidanto de Pakistano pri retiro de trupoj por ke la popolo de Jammu kaj Kaŝmiro povu libere uzi sian rajton de memdecido, kaj konsideris ĝin inda esti subtenata de la popoloj de diversaj landoj. La pakistana flanko esprimis dankojn pro la subteno de Ĉinio.

La prezidanto informis la ĉinajn gvidantojn pri la disputo pri distribuo de akvoj de Gango. La ĉina flanko ŝatis la starpunkton de Pakistano por paca solvo de


tiu problemo kaj esperis baldaŭan solvon de tiu disputo.

Pakistano ripetis ke la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko estas la sola laŭleĝa registaro de la ĉina popolo, kaj ke Tajvan estas nedisigebla parto de la teritorio de la Ĉina Popola Respubliko. La pakistana flanko esprimis firman kredon, ke sen partopreno de la Ĉina Popola Respubliko estas neeble solvi la gravajn problemojn de la nuntempa mondo, kaj ree deklaris ke la laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj devas esti tuj restarigitaj. La ĉina flanko esprimis siajn dankojn pro la amika starpunkto de Pakistano.

Ambaŭ flankoj opiniis, ke la nuna internacia situacio daŭre disvolviĝas en direkto favora al la popoloj de diversaj landoj. Ambaŭ flankoj ree deklaris, ke la popoloj de ĉiuj landoj havas la rajton solvi siajn problemojn sen ajna ekstera minaco kaj interveno. Ambaŭ flankoj esprimis firman subtenon al la aziaj kaj afrikaj popoloj en iliaj movadoj de nacia sendependeco kaj la batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo de ĉiuj formoj. Ambaŭ flankoj kondamnis la rasisman regadon de la blankulaj koloniismaj aŭtoritatoj en la Suda Afriko kaj Rodezio.

Ambaŭ flankoj unuanime esprimis sian firman volon batali por kompleta malpermeso kaj plena neniigo de ĉiuj nukleaj armiloj. La pakistana flanko notis kun aktiva zorgo la proponon de Ĉinio, t. e. kunvokon de konferenco de ŝtataj ĉefoj de diversaj landoj de la tuta mondo por diskuti la problemon pri kompleta malpermeso kaj plena neniigo de nukleaj armiloj. Pro tio la ĉina flanko esprimis siajn dankojn.

Ambaŭ flankoj interŝanĝis opiniojn pri la situacio en Hindaĉinio. Ili opiniis ke la batalo de la tri popoloj de Hindaĉinio por nacia liberigo estas justa, kaj ke la problemoj de Hindaĉinio nepre devas esti



Estas subskribata en Pekino la interkonsento de ekonomia kaj teknika kunlaboro inter la registaroj de Ĉinio kaj Pakistano. Prezidanto de Pakistano Generalo Yahya Khan kaj Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj ĉeestas la subskriban ceremonion.

solvataj de la popoloj de Hindoĉinio mem.

Ambaŭ flankoj esprimis profundan zorgon pri la situacio en la Meza Oriento. Tie, Izraelo daŭre ĝuas la fruktojn de sia agreso tute ignorante la publikan opinion de la mondo. Ambaŭ flankoj opiniis necesa, ke Izraelo nepre devas retiriĝi el la arabaj teritorioj kiujn ĝi okupis per agreso. Ambaŭ flankoj ree deklaris sian firman subtenon al la justa batalo de la popoloj de Palestino kaj aliaj arabaj landoj kontraŭ imperiismo kaj izraela cionismo por restarigi la laŭleĝajn rajtojn de la palestina popolo.

La pakistana flanko varme laŭdis la plenumpleksan progreson, kiun la sindona ĉina popolo atingis en tiom mallonga tempo, kaj admiris la profundan ŝanĝiĝon, kiu okazis en Ĉinio sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ tra la granda kultura revolucio.

Ambaŭ flankoj opiniis, ke la vizito de la prezidanto de Pakistano Generalo Agha

Mohammad Yahya Khan al Ĉinio kaj la utila interŝanĝo de opinioj inter la gvidantoj de la du landoj faris gravan kontribuon al pliaj disvolvo, fortigo kaj solidigo de la amikaj rilatoj inter la Ĉina Popola Respubliko kaj la Islama Respubliko de Pakistano.

Profitante la okazon, la prezidanto de Pakistano renovigis sian inviton al lia Ĉefministra Moŝto Ĝoŭ Enlaj viziti Pakistanon en tempo konvena por ambaŭ flankoj. La ĉefministro esprimis dankojn al la prezidanto de Pakistano kaj samtempe konigis ke li vizitos Pakistanon en kiel eble plej frua tempo.

Plene kunportante la amikecon de la ĉina popolo al la popolo pakistana, Generalo Yahya Khan, la prezidanto de Pakistano kaj liaj akompanantoj forlasis Pekinon revene al sia patrolando per speciala aeroplano, la 14-an de novembro 1970, post plene kontentiga vizito al Ĉinio.

Fiasko de la Malamika Politiko de la Usona Imperiismo kontraŭ Ĉinio

“Justa afero ricevas multe da subteno, dum maljusta afero trovas malmulte da subteno.” La malamika digo konstruita de la usona imperiismo en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj kontraŭ Ĉinio jam komencis disfali. La 20-an de novembro, 1970, en ŝtorma aplaŭdado la ĝenerala kunveno de UNO aprobis, kun 51 voĉoj poraj, 49 voĉoj kontraŭaj kaj 25 voĉoj sindetenaj, la rezolucian projekton de 18 landoj inkluzive de Albanio kaj Alĝerio, kiu postulas restarigon de la laŭleĝa sidloko de la Ĉina Popola Respubliko en UNO kaj tujan forpelon de la kliko de Ĉiang Kajŝek el tiu organizo.

Okcidentaj novaĵagentejoj raportis, ke kiam la rezolucia projekto de la 18 landoj inkluzive de Albanio estis aprobita, “ŝtorma aplaŭdado eksplodis en la kunvenejo” kaj “la varma aplaŭdado daŭris plurajn minutojn”. Post voĉdonado, la reprezentantoj de la landoj, kiuj subtenas la restarigon de la laŭleĝa sidloko de Ĉinio en UNO, gratulis unu alian kaj faris “serion da ĝojplenaj paroloj”.

La landoj voĉdonintaj por la projekto de la 18 landoj estas: Afganio, Albanio, Alĝerio, Aŭstrio, Britio, Bulgario, Birmo, Burundio, Belorusio, Kanado, Cejlono, Ĉilio, Kubo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, Ekvatora Gvineo, Etiopio, Finlando, Francio, Ganao, Gvineo, Hungario, Hindio, Irako, Italio, Kenjo, Libio, Malio, Maŭritanio, Mongolio, Maroko, Nepalo, Nigerio, Norvegio, Pakistano, la Popola Respubliko de Kongo, Pollando, Ru-

manio, Somalio, Suda Jemeno, Sudano, Svedio, Sirio, Tanzanio, Ugando, Ukraino, la Unuigita Araba Respubliko, USSR, Jemeno, Jugoslavio kaj Zambio.

Kolektinte plenmanon da komplicoj kaj lakeoj kia la reakcia Sato-registaro de Japanio, la usona imperiismo refoje elmetis la t. n. rezolucian projekton pri “grava problemoj”, intencante teni Ĉiang-klikon neelpelita el UNO kaj la laŭleĝan sidlokon de la Ĉina Popola Respubliko nerestariĝita, malgraŭ ke la Ĉina Popola Respubliko akiris la subtenon de plimulto de la voĉoj. Tiu kontraŭleĝa rezolucia projekto estis aprobita kun 66 voĉoj poraj, 52 voĉoj kontraŭaj kaj 7 voĉoj sindetenaj. En komparo kun la jaro 1969, ĉijare la poraj voĉoj malpliiĝis je 5, la kontraŭaj pliiĝis je 4 kaj la sindetenaj pliiĝis je 3. Dum la voĉdonado, silento regis la kunvenejon kaj eĉ tiuj, kiuj voĉdonis por la rezolucia projekto ne manklakis. La malsamaj scenoj kaj atmosferoj dum la voĉdonado pri la du projektoj respegulis la popularajn sentojn en la ĝenerala kunveno kaj ankaŭ la kulpan konscion kaj senprecedencan izolecon de la usona imperiismo kaj la plenmano da ĝiaj komplicoj kaj lakeoj.

Dum la debato, la reprezentantoj de multaj landoj de Azio, Afriko, Latinameriko kaj aliaj regionoj faris paroladojn en sinsekvo por kondamni la malamikan kaj agresan politikon de la usona

imperiismo kontraŭ Ĉinio. Kuba reprezentanto Ricardo Alarcon Guesada montris, ke la kliko de Ĉiang Kajŝek nun daŭriganta sian agonion en la ĉina provinco Tajvan estas “pura invento de imperiismo” kaj “rezulto de agreso de la usona imperiismo”. Rilate al la malamika politiko de Usono kontraŭ Ĉinio, jugoslava reprezentanto Lazar Mojsov diris, ke “en internacia vivo estas malpermesate por unu lando solflanke malhelpi alian landon, precipe kiam temas pri malhelpo al tia granda lando, kia la Ĉina Popola Respubliko, preni sian laŭleĝan sidlokon en UNO. Tia agmaniero estas kontraŭa al la spirito de la ĉarto kaj atencas la fundamentojn de UNO”.

Reprezentantoj de multaj landoj ankaŭ malkaŝis kaj kondamnis la t. n. projekton de “grava problemo” senskrupule elkovitan de la usona imperiismo kaj ĝian intrigon krei “du Ĉiniojn”. Cejlona reprezentanto H. Shirley Amerasinghe diris ke la t. n. projekto pri “grava problemo” elmetita de Usono estas “misuzo de la ĉarto (de UNO)” kaj “unu el la plej grandaj mirakloj de intelekta konfuzo en nia tempo”. Li aldonis ke evidente la decido de la problemo de reprezentanteco postulas nur simplan plimulton. Reprezentanto Vernon J. Mwaanga de Zambio montris, ke tia ago de Usono estas “ne nur nedemokratia kaj nerealisma, sed ankaŭ ekstreme malutila al la sanktaj interesoj de la organizo (de Unuiĝintaj Nacioj).” Franca reprezentanto Jacques Kosciusko-Morizet diris, ke UNO tute trompis sin mem per alprenado de “sinteno kaj leĝe nepravigebla kaj politike nerealisma rilate al la Ĉina Popola Respubliko”. Li montris, ke la problemo de restarigo de la ĉina sidloko “ne estas problemo de akcepto de nova ŝtato, kaj sekve ne validis por ĝi la ĉarto”. Li diris ke Ĉinio, “kiel fondinto-membro de UNO kaj konstanta membro de la Sekureca Konsilantaro”, “estas la Ĉina Popola Respubliko”. Nepala reprezentanto Padma Bahadur Khatri diris, ke “nun estiĝas ĉiam pli klara konscio pri tio, ke neniu internacia problemo povis esti signifoplene diskutita . . . sen partopreno de la Ĉina Popola Respubliko”. Li deklaris ke Nepalo kategorie oponas ĉian ajn “koncepton de du Ĉinioj”. Li aldonis ke “tiaj misgvidantaj teknikoj ofte estis aplikitaj por senigi . . . la Ĉinan Popolan Respublikon je ĝiaj laŭleĝaj rajtoj en UNO.” Multaj reprezentantoj montris en siaj paroladoj, ke “ekzistas nur unu Ĉinio, ĉar Tajvan estas parto de Ĉinio” kaj ke la intriga artifiko de “du Ĉinioj” estas tute “nepravigebla”.

Reprezentantoj de la usona imperiismo kaj plenmano da ĝiaj sekvantoj, inkluzive de la reakcia

Sato-registaro de Japanio, faris en la sesio senfortan pledon al sia rezolucia projekto pri “grava problemo”. Vidante ke la intrigo de la usona imperiismo malhelpi la restarigon de la ĉina laŭleĝa sidloko en UNO apenaŭ povis esti daŭrigata, usona reprezentanto Christopher Phillips hipokrite diris, ke “Usono estas interesita kiel ĉiu ajn en tiu ĉi salono vidi, ke la Ĉina Popola Respubliko ludu konstruan rolon en la familio de nacioj”. Sed Phillips emfazis, ke Usono firme oponas kontraŭ elpelo de la kliko de Ĉiang Kajŝek el UNO. Tio montras, ke la usona imperiismo ŝanĝis sian tonon nur por trompi aliajn por faciligi sian intensigitan praktikadon de la intrigo de “du Ĉinioj” aŭ “unu Ĉinio, unu Tajvan”. Tio ĉi estas neniam permesota de la ĉina popolo.

Imitante la tonon de sia usona mastro, la delegito de la reakcia Sato-registaro de Japanio faris ok-minutan paroladon en la sesio, emfazante la oponon de Japanio kontraŭ elpelo de la kliko de Ĉiang Kajŝek el UNO. Sato konfesis en televida programo je la 18-a de novembro ke la problemo de Ĉinio estas “la plej ĝena problemo” por li. Laŭ raporto de *Tokyo Shimbun*, la japana ministro de eksteraj aferoj Aiĉi “sendormis dum tuta nokto” en la tagoj kiam la problemo pri la ĉina reprezentanteco estis debatata en la ĝenerala kunveno de UNO. La japanaj reakciuloj, kiuj obstine sekvas la usonan imperiismon kaj prenas malamikan sintenon kontraŭ la ĉina popolo, trafos finfine certe malbonon.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris jam antaŭ 14 jaroj: **“Portempa estas la nuna situacio en kiu Usono manipulas plimulton de voĉoj en UNO kaj superregas multajn partojn de la mondo, certe venos tago en kiu ŝanĝiĝos tiu ĉi situacio.”** La rezulto de la voĉdono por la rezolucia projekto de la 18 landoj inkluzive de Albanio kaj Alĝerio en la ĝenerala kunveno de UNO jam pruvis la saĝan antaŭdiron de Prezidanto Maŭ. La direktobastono de la usona imperiismo en UNO fariĝis pli kaj pli senefika, kaj ĉiam pli malfaciliĝas por la usona imperiismo plue manipuli la voĉdonan maŝinon de UNO. Pli kaj pli multe da landoj jam leviĝis por oponi kontraŭ la krimo de la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj en ludo de forto-politikoj kaj praktiko de hegemonio en UNO. Se la usona imperiismo kaj ĝiaj komplicoj daŭrigos siajn arbitron kaj maŝinacion en UNO, ili aŭ alportos ankoraŭ pli hontindan malvenkon al si mem, aŭ fiaskon al UNO kiu suriros la vojon similan al tiu de la Ligo de Nacioj post la Unua Mondmilito.



La Usona Imperiismo Malhelpas la Restarigon de la Laŭleĝaj Rajtoj de Nia Lando en UNO

DE multaj jaroj, la usona imperiismo ĉiam arbitre kaj maljuste malhelpas la restarigon de la laŭleĝaj rajtoj de nia lando en UNO. Antaŭ 1960 la usona imperiismo faris tion per rimedo de "provizora nediskuto" manipulante sian balotan maŝinon en UNO. Sed, malgraŭ la freneza opono de la usona imperiismo kaj ĝiaj sekvantoj kontraŭ Ĉinio, ĉiam pli kreskas internacie la prestiĝo de la Ĉina Popola Respubliko kaj ĉiam pli fortiĝas la voĉo de la landoj, kiuj pledas por justeco kaj postulas la restarigon de la laŭleĝaj rajtoj de Ĉinio en UNO. Alfronate al tiu situacio, la usona imperiismo ne povis ne ŝanĝi sian

rimedon. De la jaro 1961, ĝi esprimis "konsenton" al diskuto de la problemo pri t. n. "reprezentanteco de Ĉinio" kaj kolektis Japanion kaj aliajn lakeojn por fari proponon, kiu diris ke la restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de Ĉinio en UNO estas grava problemo, kiu bezonas aprobon de plimulto konsistanta el du trionoj. La intrigo de la usona imperiismo celas daŭre ekskluzivi nian landon ekster UNO, kiam ĝi povas superregi nur malplimulton konsistantan el unu triono.

Tia impertinenta agado de superregado de UNO fare de la usona imperiismo renkontis riproĉon kaj oponon de la diverslandaj popoloj.

En novembro de 1970, UNO finfine aprobis per plimulto la proponon de Albanio, Alĝerio kaj aliaj 16 landoj pri restarigo de ĉiuj laŭleĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj tuja forpelo de la Ĉiang-Kajŝek-aj elementoj, post la aprobo leviĝis ŝtorma manklakado en la salono. Kvankam la usona imperiismo daŭre ekskluzivis nian landon ekster UNO ree per la eluzita rimedo de la "grava problemo", tamen dum la pasigo de la usona propono, silento regis en la tuta salono. La monopola regado super UNO fariĝas ĉiam pli malfacile retenebla por la usona imperiismo.

Stato de diskuto de UNO pri restarigo de la laŭleĝaj rajtoj de Ĉinio en la pasintaj jaroj

Jaro	Voĉoj por Ĉinio	Voĉoj por la usona propono	Voĉoj sindetenaj
1950	10	37	8
1951	11	36	4
1952	7	41	11
1953	10	43	2
1954	11	42	6
1955	12	41	6
1956	24	46	8
1957	27	47	6
1958	28	43	9
1959	29	43	9
1960	34	41	22
1961	37	47	19
1962	42	55	12
1963	42	56	12
1965	47	46	20
1966	46	56	17
1967	45	58	16
1968	44	57	23
1969	48	55	21
1970	51	48	25

- Notoj:**
1. La voĉoj por la usona propono ne inkluzivas la voĉon donitan de la Ĉiang-Kajŝek-a banditaro, kiu kontraŭleĝe uzurpas la sidlokon de nia lando.
 2. En 1964 UNO diskutis neniun proponon pro malhelpo de la usona imperiismo.



Batalo por Jungi Hajhe-riveron

SUB la kuraĝigo de la alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**Nepre jungu radikale Hajhe-riveron**”, post sepjara penema luktado kontraŭ malfaciloj, la popolo de Hebej-provinco de nia lando sukcesis ripari kaj ordigi kvin ĉefajn riverojn de la suda kaj okcidenta partoj de la akvosistemo de Hajhe-rivero, fundamente limigis inundon kaj akvostagnon en la baseno de Hajhe-rivero, ŝanĝis la longtempan historion de malsufiĉeco de greno en la regiono, kaj skribis brilan ĉapitron en la historio de riverjungado.

Hajhe-rivero estas fluejo tra kiu kelkaj ĉefaj riveroj de Hebej verŝis siajn akvojn en maron. Hajhe-rivero kun ĝiaj alflujaj riveroj formas la plej grandan riversistemon en Hebej, kies baseno, de Tajhang-montaro en okcidento ĝis Bohaj-marĉo en oriento, ampleksas 265,000 kvadratajn kilometrojn kaj okupas pli ol 70% de la tuta areo de la provinco.

De antikveco tiuj riveroj estis granda katastrofo por la popolo de Hebej. La fluo de la akvoj de multaj riveroj en la baseno estas tre rapida, kaj post pluvego, akvego kun flukvanto de pli ol 10,000 kubmetroj sekunde torentis muĝante en Hajhe-riveron. Sed la fluejo de Hajhe-rivero kondukanta al maro havis elflukvanton de nur pli ol 1,000 kubmetroj sekunde. Tial, kiam venis akvego ĝi inundis ĉie kaj la vasta ebenejo fariĝis senlima akvomondo.

Post la Liberigo, la popolo de Hebej entreprenis multon por utiligi la riverojn, sed pro la malhelpo de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, Hajhe-rivero ne estis radikale ordigita.

En la 17-a de novembro de 1963, en la ŝlosila momento kiam la popolo de Hebej per sia tuta forto batalis por venki la katastrofon kaŭzitan de la eksterordinare granda superakvego, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la alvokon “**Nepre jungu radikale Hajhe-riveron**”, kiu donis neelĉerpeblan forton al la popolo de la tuta baseno de Hajhe-rivero kaj levis la aktivecon de kelkdek milione nombranta popolo. Ili formis gigantan armeon por jungi la riverojn kaj komencis la batalon unue ĉe la ĉefaj riveroj en suda kaj okcidenta partoj de la akvosistemo de Hajhe-rivero. Ĉiam kiam ili sukcesis jungi unu riveron, ili tuj reformis grandan etendaĵon da kampoj. Post sepjara klopodado, ili havigis gigantan ŝanĝon al la riveroj kiuj de antikveco alportadis katastrofojn.

En la suda kaj okcidenta partoj de la riversistemo, 19 grandaj riverujoj kun totala longeco de pli ol 1,600 kilometroj estis riparitaj kaj 14 grandaj digoj kun totala longeco de pli ol 1,400 kilometroj konstruitaj. Ili komenciĝas de Tajhang-montaro kaj finiĝas ĉe Bohaj-marĉo kaj, kun giganta elflukvanto de pli ol 13,300 kubmetroj sekunde, protek-

tas pli ol 50 milionojn da muoj da kampoj de katastrofoj de inundo kaj akvostagno. En la montregionoj de Hebej, estis konstruitaj kaj plivastigitaj pli ol 1,400 grandaj, mezaj kaj malgrandaj akvokonservejoj, kiuj konservas grandan kvanton da akvo dum vintro kaj pluvsezono, kaj miloj da pumpejoj kaj pli ol 200 miloj da maŝinputoj dense dislokiĝas sur la vasta ebenejo kun reto da kanaloj, tiel ke efektiviĝis en Hebej, ke meznombre ĉiu loĝanto havas unu muon da irigaciata kampo. Pli ol duono de salaj kaj alkalaj kampoj estis reformitaj kaj en malaltaj kampoj kreskis bonaj grenoj.

La ebenejo de sudorienta Hebej estas malaltejo nomata Hejlonggang-regiono kun 47 gubernioj kaj urboj, kie la grundo estis sala kaj alkala, produktokvanto malalta kaj naturaj katastrofoj oftaj. En la pasinteco ĝi plej suferis la malutilojn alportitajn de Hajhe-rivero. Tamen, nun dank' al la plena efektivigo kaj ekfunkcio de unu el la tuta konstruado por jungi Hajhe-riveron, nome la konstruado de drena sistemo en Hejlonggang-regiono, en 1970, ŝanĝiĝis la fizionomio de ĝia agrikultura produkto kaj 46 el ĝiaj gubernioj kaj urboj fariĝis memsufiĉaj en grenprovizo aŭ eĉ havas superfluan grenon.

Dum la jungado de Hajhe-rivero, montriĝis la neelĉerpebla saĝo kaj forto de la popolamasoj en ŝanĝado de la naturo. En la sep jaroj, de sudo al nordo, ili sinsekve kompletigis tutan sistemon de drenaj konstruoj en la regiono Hejlonggang, kiu preventas stagnajn inundojn al 16 milionoj da muoj

da kampoj, fosis defluajn kanalojn Nova Zija-rivero kaj Nova Fujung-rivero, kiuj povas tralasi flukvanton de pli ol 10,000 kubmetroj sekunde, plifortikigis la nordan digon de Hutuo-rivero, plilarĝigis Duliugian-riveron, riparis kaj ordigis la akvosistemon de Daking-rivero, fosis kaj dragis 218 flankriverojn, kompletigis irigacian kaj drenan sistemon al pli ol 73,000 riveroj kaj kanaloj. La tero fosita dum la tuta konstrua laboro atingis 1,500,000,000 kubmetrojn. Se oni konstruus per ĝi muron altan kaj dikajn je 1 metro, ĝi povus ĉirkaŭi la ekvatoron 37-foje.

En la sep jaroj, sur la konstruloko estis konstruitaj pli ol 40 miloj da pontoj kaj traflujaj tuneloj ĝenerale dank' al la kombiniĝo de la laboristoj, lokaj kamparanoj kaj revoluciaj teknikistoj, kiuj rompis la fremdlandan rutinismen aplikante modernan teknikon kombinitan kun simplaj metodoj. Rigardante la pompajn konstruaĵojn radiantajn la brilon de Maŭzedongpenso kaj en kiuj kristaliĝis la saĝo de la laboranta popolo, oni pli konvinkiĝis pri la granda vero ke **“sub la gvido de la Komunista Partio, se nur estas homo, ĉiaj mirakloj povas esti kreitaj”**.

Por akiri pli grandajn venkojn en la jungado de Hajhe-rivero, la popolo de Hebej nun riparas kaj ordigas la riverojn de la norda parto de la riversistemo, kaj samtempe firmigas, plibonigas kaj kompletigas la jam starigitajn ĉefajn konstruaĵojn, por formi perfektan sistemon.

La vastaj amasoj de komunumanoj de la baseno de Hajhe energie faras fundamentan konstruadon de kampoj.



Navigebligis la Danĝerplena

Vugiang-rivero

VUGIANG-RIVERO, kiu fontas ĉe la orienta piedo de Vumeng-montaro, torentas mugante kiel furioza rabobesto tra la ravinoj en Gujĝoŭ kaj Siĉuan kun nebridebla forto kaj enfluas en Jangzi-riveron ĉe la grava urbo Fuling en sud-orienta Siĉuan.

En la malnova Ĉinio, sub la regado de la feŭdaj dinastioj kaj la reacia registaro de Kuomintango, en tiu rivero kun multaj danĝeraj malprofundejoj kaj rifoj apenaŭ povis navigi eĉ lignaj boatoj kaj por suprenveturi tra malprofundaĵo la boatoj devis sin helpi per tirado de homoj. Por ir-reiro de la pli ol 300 kilometroj inter Fuling kaj Gongtan en Siĉuan, ofte *“Monatoj bezoniĝas por la vojo, minacas ŝiprompiĝ’ je ĉiu fojo.”* En la supra parto de tiu rivero en Gujĝoŭ, navigado restis en paralizeco.

En la periodo de 1934 ĝis 1935, dum sia Longa Marŝo al la nordo por rezisti japanajn agresantojn, la Ĉina Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj plurfoje transpasis kun senkompara heroismo la naturan baron Vugiang sub persekutado kaj barikado fare de kuomintangaj reaciaj trupoj.

De post la naskiĝo de la nova Ĉinio, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, multe ŝanĝiĝis la fizionomio de Vugiang-rivero: se vojaĝantoj enŝipiĝas matene ĉe Fuling, ili povas atingi Gongtan antaŭtagmeze de la sekvinta tago; kaj krome oni povas veturi supren laŭ la rivero ĝis Vengiadian en Gujĝoŭ, tra akvovojo de pli ol 500 kilometroj. Kaj plie, nokta navigado jam sukcesis unuafoje en januaro de 1969.

VENKO DE LABORISTOJ SUPER DANĜERAJ MALPROFUNDEJOJ

Vugiang estas tipa valrivero kun multaj malprofundejoj, rapida fluo, malorda fluaspekto kaj

koncentra flufalo. 222 danĝeraj malprofundejoj troviĝas sole en la parto malsupre de Gongtan. Kaj tiaj danĝerejoj estis la ĉefa kontraŭdiro en la konstruado de la naviga vojo de tiu rivero. Ĉu motorŝipoj povis navigi en tiu valrivero? La solvo de tiu problemo ĉefe dependis de tio, ĉu oni povis venki kaj elimini la danĝerajn malprofundejojn.

Renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj sur la naviga fronto ĉiam konfidis gravajn komisionojn al burĝaraj teknikaj “aŭtoritatuloj”, kaj blinde adoris fremdlandajn “specialistojn” kiel diojn. Sed tiuj “aŭtoritatuloj” kaj “specialistoj” povis tamen elmeti neniun racian projekton por transformi Vugiang-riveron.

Sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristaro de Vugiang-rivero kreis kompletan sperton por jungi la riveron laŭ la konkretaj kondiĉoj, post plurfoja procezo de praktiko al kono kaj de denova kono al denova praktiko. Profitante la favoran vintran sezonon de riverakva malabundo en ĉiu jaro, ili forigis ŝtonbulojn kaj sablon akumulitajn en malprofundejoj kaj profundigis la fluejon, forigis ŝtonbulojn en malprofundejoj kaj rifojn per surakva kaj subakva eksplodigo, konstruis ŝipgvidajn digojn ĉe lokoj kie fluo disbranĉiĝis por kunigi ĝin kaj altigi la akvonivelon, starigis semaforojn ĉe lokoj kie fluejo kurbas aŭ mallarĝas, instalas buojn ĉe lokoj kie estas rifo en malrapida fluo, kaj ĉe lokoj kie estas portempe neforigebla kruta deklivo kun profundaĵo oni aplikis vinĉon por helpi ŝipojn dum suprenveturo.

TIMI NEK MALFACILOJN NEK MORTON

La miraklo de la navigebligado de Vugiang aperis pro tio, ke tie troviĝas trupo de navigvojoj konstruantoj, kiuj alte tenas la grandan ruĝan standardon

de Maŭzedongpenso, penlaboregas nelacigeble kaj estas plej kuraĝaj kaj tute sentimaj al morto.

500 metrojn malsupre de iu fama danĝerejo sin trovis insuleto Nigra Baraĵo alinome Ŝiprompejo. En vintro de 1964, venis tien trupo de konstruantoj. Ili firme decidis ĝisfunde transformi tiun danĝerejon sur la naviga vojo.

Por konstrui ŝipgvidan digon, oni bezonis multegon da ŝtonoj. De kie oni akiru tion? Spite al vivdanĝero, laboristoj grimpis sur rokmuron pli ol 100 metrojn altan por eksplodigi rokojn. Poste ili enŝipigis ŝtonegojn kaj jetis ilin en la riveron. Post pli ol duonjara penlaboro ili sukcesis konstrui du partojn de digo kun totala longeco de pli ol 270 metroj kaj tiam ili komencis laboron por ŝtopi la breĉon inter la du partoj.

La ŝtopado de tiu breĉo kun longeco de pli ol 20 metroj estis la plej malfacila kaj danĝera parto de la tuta konstrua laboro. La katenata fluo torentis tie kun fortego kaj povis malproksimen porti enfaligitan ŝtonpecon kun la pezo de 1-2 mil kilogramoj. Se ŝtonportanta boato ne povis resti firme ĉe tiu loko, ĝi povis esti portata de la fluo ekster la breĉon kaj droni pro kolizio kontraŭ rifo.

En tiu ŝlosila momento, laboristo Pang Hajhe brave elpaŝis kaj prenis sur sin la taskon de direktado de tiu batalo malfacila. Ekmemorante la heroaĵon de la Ruĝa Armeo de Laboristoj kaj Kamparanoj en transiro de la natura baro Vugiang, li estis forte kuraĝigita kaj kune kun la aliaj decidis lerni de la ruĝarmeanoj la sentiman revolucian spiriton por akiri venkon. Ili ligis lignan boaton per kvin bambuaj kabloj kun diametro de tetaso, kies aliajn finojn ili fikse ligis sur gigantaj rokoj ĉe supra loko de la rivero. Sub stirado de Pang Hajhe, la granda boato plensarĝita per ŝtonoj rapidis al la digo laŭ direkto de la fluo. Ĉe la breĉo, kiel kota drako la torento furiozegis kaj la boato balanciĝadis. Sed Pang Hajhe direktis aplombe la enakvigon de ŝtonoj ĝis la fino. Post pli ol duonmonata persista penlaborado, ili fine sukcese plenumis la taskon de ŝtopo de la breĉo.

NOKTA NAVIGO SPITE AL MALFACILOJ

Post kreo de naviga vojo taŭga por motorŝipo, la laboristoj por navigado de Vugiang faris revolucion kontraŭ la lignaj boatoj, kaj konstruis ferajn kaj lignajn motorŝipojn konformajn al la apartaj kondiĉoj de la akvovojo de Vugiang. Kaj senĉese longiĝis la vojo navigebla. La navigaj laboristoj de

Vugiang elmetis al si novan batalan taskon: mal-longigi la navigan periodon kaj rapidigi la cirkuladon de la ŝipoj por ŝpari tempon konforme al la bezono de la disvolviĝo de la socialisma konstruado.

La 25-an de januaro, 1969, la motorŝipoj Honggang N-ro 5 kaj Hongguang N-ro 8 iniciatis noktan navigadon. Eĉ en tago estas tre malfacile navigi en la furioze tumulta torento de Vugiang-rivero, por ne paroli pri navigo en nokto! Sed stiristo Hu Juŝu kaj aliaj laboristoj estis plenaj de memfido kaj brave puŝiĝis antaŭen sentime.

Je la 20-a horo en tiu vespero, Hongguang N-ro 8 forlasis Fuling, sub la persona stirado de Hu Juŝu.

Tiam estis sezono de riverakva malabundo kaj iuj pasejoj de la rivero fariĝis apenaŭ trapaseblaj por unuopa ŝipo, kaj iuj danĝerejoj malprofundiĝis tiel, ke la fundo de la ŝipo brue frotiĝis kontraŭ ŝtonoj sur la riverlito. En la torento tumultis ondegoj, kiuj altis pli ol la pruo. La tuta ŝipanaro unuiĝis en batalo por la komuna celo: konkeri la naturan baron kaj gajni venkon de nokta navigado.

Ĉirkaŭ la 24-a horo, Hongguang N-ro 8 venis, venkinte multajn danĝerajn malprofundejojn, al la Kvinlia Malprofundejo, kiu estis konata kiel "la plej danĝera el la danĝerejoj" de Vugiang. Tiam la brilaj lampoj de la elektra vinĉo-stacio, kiu jam pretiĝis por laboro, kaj tiuj de la ŝipo interplektiĝis kaj plene lumigis la kanjonon en la nigra nokto.

Tiu 5 liojn longa malprofundejo estis fame konata kiel "Infera Pordo" en la historio de Vugiang. Eĉ en la antaŭaj jaroj, kiam motorŝipo tage trapasis tiun lokon, la pasaĝeroj ĉiuj devis portempe forlasi la ŝipon kaj piediri laŭborde, dum la malplena ŝipo estis supren tirata de kelkcent personoj tra la danĝerejo en pli ol 2 horoj, por ne paroli pri ofta drono de lignaj boatoj antaŭ la Liberiĝo. Sed nun tute aliĝis la stato: plejparto de la rifoj estis forigitaj per eksplodigo kaj elektraj vinĉoj estis instalitaj, kaj pli grave estis, ke la navigaj laboristoj pliaŭse liberigis sian penson kaj kuraĝas brave antaŭenveturi tra ventoj kaj ondoj. Kvankam estis malfacilege navigi en nokto, tamen Hu Juŝu kaj liaj kunuloj manipulis pli zorgeme kaj antaŭen veturigis la ŝipon aplombe. Post malfacila navigado de ĉ. unu horo, ili fine sukcesis pasigi Hongguang N-ro 8 tra la "Infera Pordo" kaj daŭrigis sian veturadon.

De post tio, multaj motorŝipoj komencis navigi nokte kaj per tio malfermis novan periodon en la navigado de Vugiang.

Pomua Grenprodukto de

Hingvu-brigado Atingis

Mil Ĝinojn

ĈE montpiedo de Tiansan troviĝas avangarda unuo en lernado de Daĝaj en agrikulturo — Hingvu-brigado de Ruĝflaga Komunumo, Mikjuangubernio, la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. En 1969, la pomua produktokvanto de rizo en sola rikolto de tiu brigado atingis 1,000 ĝinojn, tio estis nova rekordo en la historio de Hingiang. Ekde 1966, la kvanto de greno vendita de la brigado al la ŝtato entute superis 1,220,000 ĝinojn, ĝia kolektiva rezervita greno atingis 14,500 ĝinojn, kaj ĝia komuna akumulo superis 164,000 juanojn, tiel ke sur la bazo de disvolviĝo de la produkto rimarkinde altiĝis la vivnivelo de la komunumanoj.

LERNI DE DAĜAJ

En 1966, varme respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ “lerni de Daĝaj en agrikulturo”, la diversnaciecaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hingvu-brigado lernis la progresintajn farojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj-brigado vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, forte teni la klasan batalon kaj entrepreni aferon en malfaciloj

sub la gvido de ĝia partia filio, kaj faris komparadon por trovi siajn mankojn.

Prenante siajn klasajn gefratojn de Daĝaj kiel ekzemplon, la diversnaciecaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Hingvu-brigado metis la vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso sur la unuan lokon antaŭ ĉiuj aliaj laboroj. Kun profunda proletara sento ili studis la brilajn “tri popularajn artikolojn” de Prezidanto Maŭ kaj liajn instrukciojn pri disvolvo de la socialisma agrikulturo. Kiel disradiana lumturo la granda Maŭzedongpenso lumigas al ili la vojon antaŭen. Kun Maŭzedongpenso kiel armilo, ili forte kritikis la krimojn de kapitalisma restaŭro faritajn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki en la kamparo, lige kun la reala klasbatalo en sia brigado kaj multe altigis sian konscion pri la klasa batalo kaj la batalo inter la du linioj kaj tiun de aliaj komunumanoj, tiel ke ĉiuj starigis la penson terkulturi por la revolucio, pli multe krei riĉaĵojn kaj pli multe produkti grenon por la ŝtato kaj la kolektivo. Krome ili ankaŭ entreprenis sciencan terkulturadon. Al ĉiuj kampoj ili faris profundan plugadon kaj zorgan kultivadon kun pliintensigita flegado. En 1966, la brigado unuafoje sukcesis akiri bonan rikolton de 729 ĝinoj da greno po muo.

KULTUREBLIGI TERON KAJ FORIGI ALKALON

En 1967, en la bonega situacio de rapida disvolvigo de revolucio kaj produkto de sia brigado, ili vidis la gigantan potencon tenatan en lernado de Daĝaj en agrikulturo. Inspirite de la revolucia spirito de siaj klasaj gefratoj de Daĝaj sinapogi sur propraj fortoj kaj peneme lukti en malfaciloj kaj konsiderante pri la vastaj nekulturitaj dezertejoj kaj alkalaj areoj, ili elmetis la sloganon "Reformu salalkalajn dezertejojn por batalakiri altan produktoton por la revolucio".

Ĉiuj kampoj de la brigado estis alkalaj. En la komenco de forlavado de alkalo, pro manko de sperto la alkala akvo estis fluigita de altaĵoj al malaltaĵoj, tial la alkalo restis ankoraŭ en kampoj, malgraŭ ke ili multe penadis. Tamen, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj neniom estis deprimitaj de la malsukceso. Ripetade studinte la brilan instruon de Prezidanto Maŭ ke "spertinte malsukceson, oni ĉerpas el ĝi lecionon kaj korektas siajn pensojn por ilin konformigi al la leĝoj de la ekstera mondo, kaj tiel povas turni malsukceson en sukceson", ili rigardis la malsukceson kiel kondukanton al sukceso, resumis la sperton kaj fine konkludis, ke necesas unue ebenigi la kampojn por forigi alkalon, kaj plenfide daŭrigis persiste la laboron de forigo de alkalo.

Post penado en kelkaj vintroj kaj printempoj ili niveligis kaj turnis ĉiujn sekajn kampojn, fragmitajn lagojn, alkalajn dezertejojn, kavojn kaj kampeĝojn en kunigitajn grandajn parcelojn de ebenaj fekundaj rizkampoj al kiuj oni povas fari irigaciadon, drenadon kaj forlavadon de alkalo. Dank' al reformo de la tuta tero de la brigado plie kreskis ĝia grena produktokvanto. En 1968, pomua produktokvanto de greno de la tuta brigado atingis meznombro 802 ĝinojn.

FOSI PUTOJN POR AKIRI AKVON

Hingvu-brigado ne havis sufiĉan akvofonton antaŭe, kaj post kiam la areo de ĝiaj kulturataj kampoj vastiĝis ĝis pli ol 4-oblo en komparo kun

tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo dank' al ebenigo kaj alkalforigo de la tero en sekvaj jaroj, ankoraŭ pli akriĝis al ĝi la nesufiĉeco de akvo. Tial, en jaro de sekeco, la disvolvigo de agrikultura produkto multe suferis de manko de akvo.

Por solvi la problemon de akvo, en vintro de 1968 la revolucia komitato de la brigado denove organizis la vastajn komunumanajn amasojn ripetade studi la "tri popularajn artikolojn" por stimuli ilin al daŭra revoluciado. Tiam malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elmetis la batalan sloganon "Fosi putojn por akiri akvon kaj nepre batalakiri pomuan produktokvanton de mil ĝinoj". Ili nek prunteprenis monon de la ŝtato, nek petis helpon de aliaj lokoj, kaj komencis fosi putojn tute per siaj propraj fortoj.

La subtera akvonivelo de la brigado ĝenerale troviĝas pli ol 30 metrojn sub la tersurfaco. Krome, por ĝin atingi estis necese trafosi tre dikan kaj malmolan rokan tavolon kaj disfaleman sablecan tertavolon. Fosi putojn en tia loko ja estis malfacile por ili, al kiuj mankis kaj mekanikaj instrumentoj kaj tekniko. Sed, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la putofosa taĉmento firme kredis la gigantan potencon de Maŭzedongpenso. Por preventi falon de putomuro ĉe sableca tertavolo, ili cementis ĝin per ruĝa argilo dum fosado; renkontante malmolan rokon, ili unue dispecigis ĝin per memfarita dispecigilo kaj poste elfosis la fragmentojn.

En la malfacila batalo por fosi putojn, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj verŝis sian profundan proletaran amon al Prezidanto Maŭ kaj la deziron multe kontribui al la ŝtato en siajn praktikajn agojn de putofosado, timante nek malfacilojn nek laciĝon. Ne havante elektromotoran ekipaĵon, ili tagnokte rondiris senĉese ĉirkaŭ drilstangon turnante ĝin. Por gajni tempon, ili laboregis alterne en tri deĵoroj tage kaj nokte por ke la drilego ne ĉesu turniĝi eĉ je sola minuto. Tiamaniere, post peniga lukto en unu vintro kaj unu printempo ili fine sukcesis fosi tri putojn pli ol 30 metrojn profundajn kun totala flukvanto de 90 kubmetroj en sekundo, kaj solvis la problemon de akva fonto de sia brigado. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj decidis fari novajn kontribuojn al la ŝtato kun pli alta revolucia fervoro.

Prospera Stepo Tianŝan

Stimulate de la spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio, la diversnaciecaj paŝtistoj de la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono vaste kaj profunde disvolvis la amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso kaj starigis la penson servi al la popolo. Kun la penso bredi ŝafojn por la revolucio kaj kun la efektivigo de scienca bredado ili rapide disvolvis la bredadon de hingiang-aj fajnlanaj ŝafoj karakterizitaj per granda korpopezo, fajna viando, abundo de subtila lano, fekundeco, adaptiĝemo al medio kaj konveneco al paŝtado en grandaj gregoj. Nun, sur la stepo Tianŝan prosperas grasaj gregoj de bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj. Ĉi tie la paŝtistoj akiris riĉrikoltojn unu post alia en bredado.



Kazaĥa leterportisto Muhamajtihan ĝustatempe portas novaĵojn pri la bonega situacio en- kaj ekster-landa al ĉiuj jurtoj de izolitaj montaj paŝtejoj.



Ĉiu produkta grupo de la paŝtaj regionoj jam havas siajn paŝtajn teknikistojn kaj veterinarojn. Jen veterinaroj elŝprucigas insekticidojn al ŝafaro.






Sin apogante sur propraj fortoj kaj luktante en malfaciloj, paŝtistoj konstruas stalojn por ke la brutoj sekure pasigu vintron.

Kazaĥa intelekta junulino Najzircguli (dekstre) diligente kaj vive studas kaj aplikas Maŭzedongpenson kaj bredas ŝafojn por la revolucio. La 320 hingiang-aj fajnlanaj ŝafinoj de ŝi paŝtataj naskis 341 ŝafidojn. Pro sia kontribuo al la ŝtato ŝi estis laŭdata de ĉiuj.





Kun la penso paŝti por la revolucio paŝtistoj bredas ŝafojn per sciencita metodo tiel ke la multnombraj ŝafidaroj ĉiuj estas grasaj kaj sanaj.



En la popolaj komunumoj en la valo de Ili-rivero ĝenerale fondiĝis stacioj de artefarita generigo de ŝafoj, en kiuj oni efektivas artefaritan impregnadon al ĉiuj ŝafinoj, tiel ke rapide multiĝas fajnlanaj ŝafoj.

Kazaĥaj virinoj aktive partoprenas kolektivan laboron, produktas por la ŝtato fanditan buteron por fari sian kontribuon al socialismo.



Kondukanto de Juehi-brigado

INTER la amasoj vaste cirkulas la rakonto pri avangardaj agadoj de kamarado Jing Siguan, sekretario de la partia filio de Juehi brigado, Juehi-komunumo, Ninghaj-gubernio, kaj aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso en Ĝegiang-provinco.

Inter la raportoj pri partopreno de kadroj en fizikaj laboroj de Ĝegiang-provinco, pri kiuj Prezidanto Maŭ propramane faris instrukcian noton je la 9-a de majo 1963, troviĝas unu titolita "Jing Siguan estas bona tiel en fizika kiel ankaŭ en gvida laboro".

De 7 jaroj, sub la direktado de la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ, Jing Siguan persistas en partopreno de fizika laboro kaj senĉese progresas strikte sekvante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ. En la Granda Proletara Kultura Revolucio li estis elektita kiel membro de la revolucia komitato de Ĝegiang-provinco kaj vicestro de la revolucia komitato de Ningbo-regiono. Ŝanĝiĝis lia pozicio, sed ne ŝanĝiĝis ĉe li la naturo de la laboranta popolo.

Estis en oktobro de 1958. Por ŝanĝi la postrestintan fizionomion de Juehi, la partia organizo de Juehi-komunumo decidis transpostenigi al Juehi-brigado kamaradon Jing Siguan, kadron de Ŝantoŭjing-brigado, tiam avangarda agrikultura unuo de la tuta gubernio. Ricevinte la sciigon Jing Siguan, kiu tiutempe ĉeestis kunvenon en la komunumo, tuj surportis sian tornistran kaj ekrapidis rekte al Juehi-brigado kun verkoj de Prezidanto Maŭ.

En la sekvinta tago de lia alveno al Juehi-brigado, li jam iris al kampo por partopreni fizikan laboron kune kun la komunumanoj de la brigado. Vespere li vizitis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kaj interparolis kun ili por ekkoni la staton de la brigado.

En la unua jaro post alveno al Juehi la familio de Jing Siguan enspezis je 40% malpli ol en Ŝan-

toŭjing. Pri tio iu diris, ke li kvazaŭ "saltis el korbo de rizo en tiun de brano". Sed Siguan diris brave: "Mi estas kompartiano kaj ne celas personan komforton. Kie pli grandaj estas malfaciloj, pli mi devas tien iri!" Nelonge poste la tuta familio de Jing Siguan transloĝiĝis al Juehi.

En Juehi-brigado estas sume pli ol 800 muoj da agro, inter kiuj 600 muoj estas de marĉaj kampoj. Maljunaj malriĉkamparanoj diris al li: La malriĉeco de Juehi trovas siajn radikojn ĝuste en tiuj marĉaj kampoj. Por pliprodukti grenon oni devas unue reformi tiujn kampojn.

En la komenco de vintro komenciĝis la laboro de reformado de marĉaj kampoj! En tiu tago Jing Siguan venis kune kun kelkaj aliaj kadroj de la brigado al Juehitang spite al frosta vento. Tie la marĉoj kaj riveretoj interplektiĝis, kaj kune prezentiĝis blanka tuto. Refaldinte la pantalon-tubojn, Jing Siguan la unua saltis en malvarmegan akvon. Liaj piedoj sensentiĝis pro malvarmego, sed li alprenis ŝovelilon kaj persiste laboris. Sub lia edifo komunumanoj unu post alia ĵetis sin en la batalon. Ili faris multajn kampdigeojn kaj fosis multajn laĝetojn.

Neatendite, post pluvego, torento detruis la kampdigeojn. Antaŭ la malfaciloj kaj klaĉoj de klasaj malamikoj, Siguan kun plena revolucia sentimeco diris: "Eĉ ĉiele granda malfacilo ne povas timigi malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn armitajn per Maŭzedongpenso!" Ankaŭ la komunumanoj unuvoĉe diris: "Mizeraj estas montoj kaj akvoj de Juehi, sed ne mizera estas la volo de ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ni volas nepre reformi la marĉkampojn kaj ankaŭ tion povos!"

En la sekvinta tago, kiam apenaŭ tagiĝis, la komunumanoj sub la gvido de Siguan sin ĵetis



Kamarado Jing Siguan (la unua de maldekstre) parolas kun komunumanoj en kampo pri sia spertaĵo en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

ree en la laboron de reformado de marĉkampoj malgraŭ muĝanta norda vento.

Post penado de kvar vintroj kaj kvar printempoj ili fosis 36 kanalojn de diversaj grandecoj, konstruis 72 kampdigojn, kaj unu akvokonservejon kaj tiel forkondukis la stagnan akvon. De tiam la 480 muoj da marĉaj kampoj estis transformitaj en riĉrikoltajn kampojn timantajn nek sekecon nek pluvabundon kaj ilia pomua produktokvanto de greno pliiĝis de pli ol 300 ĝinoj ĝis pli ol 700.

En aprilo de 1969, kun senkompara emociiĝo Jing Siguan glorie partoprenis la Naŭan Tutlandan Kongreson de la Partio. Dum la Kongreso Prezidanto Maŭ foje-refoje donis instruon rilate al kadroj: **“Zorgu, ke ili ne disiĝu de la amasoj, ne disiĝu de produktado kaj samtempe laboru.”** La instruo de Prezidanto Maŭ kvazaŭ vojlampo lumigis la koron de Jing Siguan. Li diris: “La instruo de Prezidanto Maŭ montris al mi direkton de daŭra revolucio, tio estas plej granda zorgo kaj plej granda amo al ni.”

Nelonge post la Naŭa Kongreso, kiam Jing Siguan revenis al sia vilaĝo de kunveno aliloke, iu komunumano diris al li: “Vi malsupreniris al ni!” Aŭdinte tion, Siguan malkvietiĝis en la koro: En la pasinteco kiam la komunumanoj vidis min, ili ĉiam diris “vi revenis!” kial oni diras “vi malsupreniris” nun? Eble la kaŭzo kuŝas en tio, ke lastatempe mi multe kunvenis kaj malmulte laboris sur kampoj kaj tiel malproksimiĝis de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Kun tiu problemo Jing Siguan ripetade studis en profunda nokto la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Ĝi (materiisma dialektiko) konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj.”** La vortoj de Prezidanto Maŭ kvazaŭ oraj sunradioj lumigis lian menson. Kvankam kunvenoj kaj gvidaj laboroj estas pli multaj ol en la pasinteco, tamen tio estas nur eksteraj kaŭzoj, la fakto, ke mi ne havas altan memkonscion pri persistado en partopreno de kolektiva produkta laboro kaj firman revolucionan volon, estas la internaj kaŭzoj kiuj ludas decidan rolon. Li profunde ekkomprenis, ke ju pli multa estas la laboro kaj peza la tasko, des pli oni devas komandi ĉion per politiko, kapti ĉiun okazon por partopreni fizikan laboron kaj strikte ligiĝi kun la amasoj. De tiam, li forlasas neniun okazon por labori sur kampoj tute egale, ĉu la tempo kaptebla estas unu tago, duontago, aŭ nur unu horo.

Foje, kiam Siguan revenis al la vilaĝo de la kunveno en la provinca ĉefurbo, jam estis post la kvina horo posttagmeze. Ii demetis sian tornistron sur la kamprandon kaj tuj eksarkis kune kun la komunumanoj. La lastaj kore kaj zorge diris: “Jam malfrue estas, kaj baldaŭ finiĝos la laboro. Iru ripozi!” Siguan respondis: “Estas bone por mi sarki eĉ du striojn. Pli da fiziklaboro, pli da imuneco kontraŭ la burĝara ideologio.”

Nun la bona kadro Jing Siguan, kiu persistas en partopreno de fizika laboro, vicleplene kaj brave marŝas antaŭen sur la brila vojo de daŭra revolucio.

Skoltoj de Subtera

Trezoro

NIA lando havas riĉajn mineralajn fontojn. Por esplori kaj malfermi subterajn trezorejojn por socialisma konstruado, niaj geologiaj laborantoj dum longaj jaroj batalas sur altaj montoj kaj vastaj dezertoj kaj stepoj, spite al brula varmo, ventoj kaj neĝoj. Ili servas kiel skoltoj de subteraj trezoroj kaj pioniroj de industria konstruado socialisma.

I

En profundaj montoj sur la altebenejo de Junnan kaj Gujĝoŭ estas malfacile spiri pro la alta temperaturo de pli ol 40°C dum varmega somero. Taĉmento de la 3-a geologia trupo de la Geologia Buroo de Junnan-provinco sekvis la vojon iritan de la Ruĝa Armeo sub la ardanta suno grimpante montkrutaĵojn kaj vadante tra riveroj kaj peneme luktadis en la areo nomata "Montoj de Flamoj".

Ili demetis siajn tornistrojn sub iu arbo kaj komencis revolucionan kritikan kunvenon. Daj Ĉengji, estro de la partia ĉelo, laŭte voĉlegis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: "**La filozofio de la Komunista Partio estas filozofio de batalo**". Sub la direktado de Maŭzedongpenso, la taĉmentanoj retrorigardis la historion de sesfoja veno de geologiaj laborantoj al la "Montoj de Flamoj". Oni jam frue trovis spurojn de metala erco. Sed antaŭe venis al la loko iu fremda "specialisto", li pririgardis de malproksime kaj rikanis dirante: "Kompatinde! Kompatinde!" Kaj per tio li verdiktis pri "mortigo" al la metala mino! La taĉmentanoj severe kondamnis la "filozofion de sklaveco antaŭ fremduloj" kaj "rampismon" propaganditajn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.

Ili diris brave: "La erco troviĝas sub nia tero, sed ne en la libroj de fremduloj! La fremda 'specialisto' tute ne enketis la geologiajn kondiĉojn de la regiono kaj babilaĉis laŭplaĉe, tio estis tipa subjektiva ideismo."

La revolucia kritiko forbalais la obstaklojn sur la vojo, kaj la brilaj filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ donis senfinan saĝon kaj forton al la geologiaj laborantoj. "**Enketi ĝa estas solvi problemon.**" Ili decidis eniri en la malnovan galerion kie oni trovis la spuron de la metala erco, por fari profundajn esplorojn, kaj fine trovis novajn spurojn.

Informite pri tio, la tuta membraro de la 3-a geologia trupo venis unuj post aliaj al la loko kun granda ĝojo kaj freŝa kuraĝo. Bruis drilegoj, galerioj estis borataj profunden, ekzempleroj de eltirita erco estis analizataj. . . Por plej rapide ekkoni la staton de la minkorpo la geologiaj laborantoj, kiuj kombinis revolucionan spiriton kun scienca sinteno, faris detalan analizon al pli ol 5,000 ercekzempleroj. Grandkvanta materialo atestis ke la ercotavolo estas tre dika kun rimarkinde granda amplekso.

La brilaj filozofiaj pensoj de Prezidanto Maŭ revivigis la minon al morto kondamnitajn de la fremdlanda "specialisto". La fera fakto deklaris la bankroton de la subjektiva ideismo kaj "filozofio de sklaveco antaŭ fremduloj".

II

En frosta vintro sur Kilian-montaro muĝas norda vento kiu kun neĝflokaj kaj sableroj sin ĵetas sur la vizaĝon de homoj, tiel ke ili ne povas malfermi siajn

okulojn kaj sentas tranĉan doloron. Kamaradoj de la 1-a taĉmento de la 4-a geologia trupo de la Geologia Burco de Gansu-provinco portante kun si verkojn de Prezidanto Maŭ persistis labori tie sub libera ĉielo en vintro ekde 1968. Poste, ili sin movis al Gobio kaj stepo, kaj plenumis tie la esploran taskon de du gravaj ercoregionoj altrapide kaj altkvalite. Por trovi pli da minoj, pli riĉajn minojn, ili ree venis en Kilian-montaren vintre de 1969 por esplori novan ercoregionon, disvolvante sian laborstilon de braveco en batalo, de malĉimo al sinofero kaj laciĝo kaj de kontinua batalado.

Por transporti grandan kvanton da esploraj ekipaĵoj kaj materialoj en la ercoregionon, necesis konstrui provizoran ŝoseon kondukantan al ĝi. Tiam formiĝis tuj taĉmento por skolti kaj malfermi vojon. En la laboro la taĉmento hakis montojn kaj plenigis kavaĵojn, kaj superpontis riverojn. Subite, rokmuro kun longeco de unu kilometro kaj alteco de pli ol 50 metroj baris al ili la vojon.

Komencis la batalo por dehaki rokojn kaj malfermi vojon. La kompartiano Hie Ĉangking, veteranaj laboristoj Jin Gifang kaj Li Ĵujlin kaj eksarmeano Zoŭ Vangin prenis sur sin la danĝeran taskon de borado kaj ekbruligo de eksplodigiloj. Ili surgrimpis la rokmuron, recitante en si la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**. Kaptante arboradikojn, tretante rokfendojn kaj premante sian korpon sur la rokmuron ili pene sin levis kaj fine sukcesis konkeri ĝin altan pli ol 50 metrojn, kaj venis al la supro. Tiam ili ligis sian talion per ŝnuregoj por malleviĝi glitante laŭ la rokmuro kaj bori truojn pendante en aero. Post eksplodigoj, grandaj rokoj kaj frostitaj teraĵoj, kiuj estis elŝovitaj de sia loko, en ĉiu momento povis defali. Alfrontante la danĝeron, Zoŭ Vangin la unua surgrimpis sur la rokmuron kaj forigi ilin. Ĝuste tiel, disvolvante la revolucionan spiriton timi nek malfacilojn nek morton, ili elhakis vojon ĉe la meza parto de la rokmuro kaj garantiis la laŭplanan transporton de ekipaĵoj kaj materialoj al la esplorado.

III

Estis frosta vintro. Neĝegis en Dujgiugoŭ-komunumo, Fengĝen-gubernio, Interna Mongolio, kaj la temperaturo defalis ĝis pli ol 30°C sub nulo. Sed, viveco regis en la oficejo de Dujgiugoŭ-brigado. La propaganda parolado de la 103-a geologia trupo de la Geologia Buroo de la Aŭtonoma Regiono

de Interna Mongolio pri serĉo de erco fare de amasoj absorbis la atenton de la lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Apenaŭ finiĝis la parolado, malriĉkamparano Hju Liang prezentis pecon post peco al la geologia trupo ercaĵojn, kiujn li kolektis kaj konservis de multaj jaroj. “Vi prezentas ne nur ercaĵojn sed ankaŭ la ruĝan koron de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj senlime fidelan al Prezidanto Maŭ, kamarado Hju Liang!” diris la kamaradoj de la geologia trupo premante al li la manon. Tre emociita, Hju Liang nur post longa tempo sukcesis eldiri la frazon: Vi ja estas alsenditaj de Prezidanto Maŭ.

De pli ol dek jaroj, dum kiuj Hju Liang serĉis ercaĵojn kaj raportis pri la trovlokoj, li renkontis multajn malhelpojn kaj malagrablaĵojn.

En 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio persone ellaborita de Prezidanto Maŭ **“streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”**, alte tenante la tri ruĝajn flagojn de la ĝenerala linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Dujgiugoŭ varme respondis kune kun la tutlanda popolo la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ **“disvolvi minindustrion”** kaj aktive partoprenis la amasan movadon de serĉo de erco kaj raporto pri ĝiaj trovlokoj. En tiu movado Hju Liang montris sin plej fervora kaj plej energia. Kiam li informiĝis ke oni elfosas metalan ercon el Nianliumonto, li pensis ke la montoj ĉe lia vilaĝo estas etendiĝo de Nianliu kaj apartenas al la sama montĉeno kaj iras en la sama direkto kiel ĝi. Se Nianliumonto enhavas ercon, probable ankaŭ niaj montoj entenas ĝin. De tiam li konstante surgrimpis sur la montojn por serĉi ercojn. Li trairis ĉiujn altajn montojn ĉe Dujgiugoŭ, ĉe la tutan montĉenon ĝis Nianliumonto kaj fine trovis tiajn ercaĵojn ĉe iu montpiedo en Dujgiugoŭ-komunumo. La koncerna aŭtoritato de la gubernio faris enketon laŭ la raporto de Hju Liang kaj komencis ekspluati la ercon tie. Ĝojegis Hju Liang, kiam li vidis elfositajn ercoŝtonojn.

Sed, en tiu tempo la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en geologia fako plenenergie antaŭenpuŝis kontraŭevolucian reviziisman linion kaj strangolis la aktivecon de la amasoj en serĉado de kaj raportado pri ercoj, arbitre asertante ke la raportoj de

la amasoj estas “nesciencaj” kaj “nekredindaj”.

Hju Liang, kiu multe suferis en sia infaneco, havas grandan malamon kontraŭ la malnova socio kaj varman amon al la nova. Li tutanime iras la socialisman vojon sekvante Prezidanton Maŭ. Li pensis, kiel oni povas entrepreni la socialisman konstruadon sen ŝtalo kaj fero. Por fabriki ilin, necesas erco, kiun oni devas unue trovi. Ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj do serĉu tion ĉe la fronto.

Ĉiufoje kiam Hju Liang hakkolektis brullignojn kaj falĉis herbojn sur montoj, iris al kampo aŭ faris vizitojn, li iris laŭ montvojo, kiun aliaj ne prenis, por trovi neordinarajn ŝtonojn. Foje, kiam li vizitis parencon, li trovis dumvoje nombron da

fosforitaj ŝtonoj. Li levis pecon kaj zorge ekzamenis ĝin. Kun granda ĝojo li diris al la maljunulo apude pluganta kampon: “Kara avo, jen bona erco fosforita tre utila por agrikulturo. Rapidu al la brigado por raporti pri la trovo.” Tion dirinte li daŭrigis sian vojon. Post kelka tempo li speciale vizitis la lokon kaj kontente revenis, kiam li vidis ke ĉaroj post ĉaroj da elfosita fosforita erco estas transportataj al kemisterka fabriko.

En la pasintaj pli ol dek jaroj, Hju Liang raportis pri 4 specoj de erco kaj 18 ercohavaj punktoj. Nun li jam povas distingi pli ol dudek specojn de erco, kaj pro tio estas titolita de la amasoj kiel kampula geologo.



PLASTAJ EKSTERAĴOJ DE OLEPUMPILOJ

Lastatempe, la Hubej-a Fabriko de Olepumpiloj kaj Oleŝprucigaj Bekoj sukcese fabrikis plastajn eksteraĵojn de olepumpiloj de diversaj tipoj, kiuj estas facile fabrikeblaj, malpezaj kaj solidaj. Ili estas bonvenigataj de la klientoj kaj dank’ al ilia produkto metalo povas esti ŝparita.

En la pasinteco, tiu fabriko produktis eksteraĵojn de olepumpiloj ĉiam el gisfero, por kio necesis prilaborado per dekelkaj maŝinoj. La procedo estis longa, la laborefiko malalta kaj la produktokosto alta. La laboristoj de la fabriko aktive disvolvis teknikan renovigon kaj firme decidis produkti plastajn eksteraĵojn de olepumpiloj per siaj propraj fortoj. Ili faris olean premaŝinon el pecoj de malnova premaŝino por produkto de oleo kaj kelkajn aliajn simplajn ekipaĵojn kaj rapide sin ĵetis en provproduktion de plastaj eksteraĵoj de pumpiloj.

Dum la provproduktado, ili senĉese resumis sian sperton kaj finfine sukcese produktis tion.

PLURAJ PRODUKTAĴOJ EL SOVAĜAJ VEGETAĴOJ

La Alkoholaja Preparejo Gintan de Giangsu energie entreprenis multflankan utiligon de smilako kaj aliaj sovaĝaj vegetaĵoj kaj sukcesis produkti el ili tanin-materialon, *Geotrichum candidum*, nukleatan acidon, organikan fosforon, inositolon (*CHOH*)₆, *Bacimmus galleria*, kreskigaĵon 920, fosfatan sterkon, donante fortan subtenon al la industria kaj agrikultura produkto.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj de la Alkoholaja Preparejo Gintan aktive provis prepari alkoholaĵon el sovaĝa vegetaĵo smilako anstataŭ greno kaj ŝparis grandan kvanton da greno. Post disvolvo de movado de pliprodukto kaj ŝparo, la laboristoj lernis koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ kaj ekkonis, ke multon oni povas fari en multflanka utiligo de materialoj. Ili tro-

vis ke la feĉo entenas taninon kaj estas bona kruda materialo por produkti tanin-materialon. La laboristoj do mem komencis fari eksperimentadojn kaj sukcesis produkti likvan tanin-materialon per simpla metodo kaj en mallonga tempo sukcesis konstrui kaj ekfunkciigi simplan instalaĵon kun produktpovo de 500 tunoj da solida tanin-materialo en ĉiu jaro. Kaj poste, la laboristoj ekstraktis per simpla metodo laŭnorman *Geotrichum candidum* el la “restanta sukero” tenata en la feĉo de smilako. Kaj krome, ili ankaŭ ekstraktis nukleatan acidon el *Geotrichum candidum* kaj poste nukleotidon el nukleata acido. Dank’ al apliko de la lastaj du kemiaĵoj en agrikulturo, oni povas plialtigi la produktokvanton de rizo.

PLEKTOMAŜINO DE OKOBLAJ KABLOJ

La Nordĉinia Fabriko de Maŝinfaritaj Ŝnuroj sukcesis fari plektomaŝinon de okoblaj kabloj kaj faris per tio novan paŝon en disvolvo de la produkto de ŝnuroj en nia lando.

La okoblaj plektitaj ŝnuregoj estas uzataj kiel kabloj aŭ ankrokabloj por oceanaj ŝipoj. Ili estas fleksiĝemaj kaj eltenemaj al fro-tado, netordiĝemaj kaj tre solidaj.

Lastatempe eldonita

Elektitaj Verkoj de Maŭ Zedong

Volumo I

(en Esperanto)

En la volumo estas kolektitaj 17 verkoj de kamarado Maŭ Zedong skribitaj en la periodoj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924 — 1927) kaj la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927 — 1937).

La volumo estas eldonita ankaŭ en la lingvoj angla, araba, birma, franca, germana, hindia, hispana, indonezia, itala, japana, korea, persa, portugala, rusa, taja kaj vjetnama.

312 pĝ. 15×10 cm. kun ruĝa plasta kovrilo

Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio
Distribuas: Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Printempo en

Malnova Urbo

HINING estas malnova urbo kun historio de pli ol 1,500 jaroj sur la altebenejo de Kinghaj. En la pasinteco tie troviĝis preskaŭ nenia industrio. Post la Liberiĝo, precipe en la jaro 1958, sub la direktado de la brilo de la ĝenerala linio de la Partio por konstrui socialismon, la popolo de Hining-regiono disvolvis la spiriton de homoj en malriĉeco, nome: **“malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio”**, havigante al sia loko unuapaŝan disvolviĝon de la industria produkto. Tamen pro subfoso kaj malhelpo de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, la industria produkto en Hining disvolviĝis tre malrapide.

La Granda Proletara Kultura Revolucio vekis grandan revolucionan energion ĉe la laborista klaso kaj la vastaj amasoj de Hining, kaj per siaj diligentaj manoj ili multe ŝanĝis la industrian fizionomion de la malnova urbo.

Konstrui Altfornon laŭ Principo de “Multeco, Rapideco, Boneco kaj Ekonomieco”

Je la 3-a de majo 1970, la respondeculoj de la komandejo por konstrui la Kinghaj-an Ferŝtalan Fabrikon venis kun 24 laboristoj kaj kadroj sub

sia gvido al dezerta vastejo en antaŭurbo de Hining, portantaj kun si verkojn de Prezidanto Maŭ. Ĝuste sur tia dezerto, kie estis nek akvo, nek elektro, nek loĝejo, la laboristoj kaj revoluciaj kadroj, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **“sinapogi sur propraj fortoj”** kaj **“peneme lukti en malfaciloj”**, komencis la konstruadon de la Kinghaj-a Ferŝtala Fabriko. Por solvi la problemon de loĝejo, ili starigis tendojn kaj konstruis terdomojn; mankis akvo, ili alportis ĝin de malproksime; mankis ekipaĵoj kaj materialo, ili per simplaj metodoj riparitis kaj utiligis la malnovajn kaj mem fabrikis novajn, kaj tiel venkis malfacilojn unujn post aliaj.

Poste, pluraj centoj da konstruaj laboristoj, instalistoj, fornokonstruistoj, akvokondukilaj laboristoj kaj elektristoj venis al la konstrua loko kaj sin ĵetis en la streĉan batalon. Tuj post sia alveno, kun alta revolucia energio spite al vento kaj pluvo la konstruaj laboristoj baldaŭ plenumis la ferbetonan labortaskon por altfornoj kaj blovfornoj. La instalistoj per tradicia metodo sukcese instalas la fornokorpojn.

Sub la brilo de Maŭzedongpenso post la batalo de pli ol 50 tagnoktoj venke starigis la unua altforno de la Kinghaj-a Ferŝtala Fabriko en la fino de junio de 1970. En la unua de julio ĝi jam unuafoje elfluigis la unuan furnon da fandita fero.

Samtempe kun ekfunkcio de la Kinghaj-a Ferŝtala Fabriko venke naskiĝis ankaŭ la Hining-a

Ferŝtala Fabriko kaj el kies altforno elfluis ankaŭ la unua forno da bolanta fandita fero.

Entrepreno de Elektronika Industrio

Ankoraŭ en 1969, laboristoj de la Unua Ilmaŝina Fabriko de Kinghaj jam proponis provadon por produkti mem elementajn partojn de regata silicio. Aktive subtenante la proponon, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj de scienca fakto de la Kinghaj-a Pedagogia Instituto decidis fari esplorojn kune kun la laboristoj.

Ĉu oni povas vere produkti regatan silicion sur Kinghaj-a Altebenejo kiu situas pli ol 2,000 metrojn super la marnivelo? Pri tio la instruistoj kaj studentoj de la Kinghaj-a Pedagogia Instituto disvolvis varman diskuton sub la helpo de la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento en la instituto. Post serioza studo de la instruo de Prezidanto Maŭ **“La havaĵoj de la socio estas kreitaj de la laboristoj, kamparanoj kaj laborantaj intelektuloj mem. Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla”**, ĉiuj trovis por si klaran direkton de antaŭeniĝo. Ili diris, ke nenia malfacilo estas nevenkebla por tiuj, kiuj sin direktas per Maŭzedongpenso. Kaj la esplora grupo por produkto de regata silicio konsistanta el instruistoj de scienca fakto komencis sian laboron.

Mankis al ili hidrogeno, nitrogeno kaj argono ĝenerale bezonataj por produkti regatan silicion. Ili do reformis teknologion kaj solvis tiun problemon per memelpensita metodo. Post tio ili faris klopodojn en sennombraj fojoj kaj fine sukcesis produkti unuan nombron da elementaj partoj de regata silicio. La provado pruvis, ke ili estas bonkvalitaj kaj ties teknikaj parametroj atingis la ŝtatan normon. Tio kreis favorajn kondiĉojn

por Kinghaj en disvolvo de la elektrona industrio kaj industria produkto.


Ĉie Floras Loĝkvartalaj Fabriketoj

En la prospere leviĝanta nova alttajo de la socialisma konstruado nombro da fabrikoj funkciigataj de urbaj loĝantoj kaj familianoj de laboristoj kaj kadroj rapide aperadis kvazaŭ fungoj post la printempa pluvo en Hining-a regiono. Tiuj fabrikoj kvankam malgrandaj havas altan ambicion. Laŭ la bezonoj de industria kaj agrikultura produktado kaj la vivo de la amasoj, ili alprenis la principon de kompleksa produkto kun unu objekto kiel la ĉefa kaj aliaj kiel la flankaj laŭ la bezonoj de la ŝtato. Krome, ili funkcias ŝpareme, plene utiligante simplajn kaj malnovajn materialojn kaj ekipaĵojn facile disponeblajn kaj kontribuas por ŝanĝi postrestintan fizionomion de la industrio de Kinghaj.

La Hining-a Fandejo de Neferaj Metaloj estas malgranda loĝkvartala fabriko kun malpli ol cent laboristoj. En la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio kiam ĝi estis ĵus starigita, en ĝi laboris nur tri homoj. Tiuj masonis mem kupro-fandan fornon, venigis kelkajn familianojn de laboristoj kaj junajn metilernantojn kaj rapide komencis la laboron. Kun nefleksebla revolucia spirito ili ne nur produktis kupron, sed ankaŭ altigis iom post iom la koeficienton de ekstrakto de kupro.

De la lastaj jaroj ili havigis al si 18 ilmaŝinojn kaj 17 muldilojn per riparo kaj utiligo de malnovaj ekipaĵoj. Per tiuj ekipaĵoj ili produktis por la ŝtato pli ol 170 tunojn da kupro kaj kvanton da aluminio, plumbo kaj aliaj valoraj metaloj, tiel ke ĉiu laboristo meznombro kreis por la ŝtato riĉaĵon de pli ol 13,000 juanoj nur en la jaro 1970. Nun ili fabrikas pogrande 11 produktaĵojn kun malsamaj normoj, kiuj ne nur kontentigas la lokajn bezonojn sed ankaŭ subtenas aliajn fratajn regionojn kaj provincojn.





Mi Amas la Grandajn

Arbarojn de Nia Patrolando

MA JONGSUN

MI amas la grandajn arbarojn de la Malgranda Hing-an-montaro de nia patrolando. En la pasintaj 30 jaroj, mi laboris kaj vivis en tiuj grandaj arbaroj. En 1945 la nordoriento de la patrolando estis liberigita, la brila sunlumo de Maŭzedongpenso lumigis la senlime vastajn arbajn marojn de la Malgranda Hing-an-montaro, la grandaj pr-arbaroj revenis al la sino de la popolo, reakiris sian

junecon kaj fariĝis natura trezorejo neelĉerpebla por la socialisma konstruado de la patrolando; miloj da arbistoj baraktintaj sub la vipado de la japanaj agresantoj fariĝis mastroj de la grandaj arbaroj. Ankaŭ mi akiris novan vivon, kaj sub la nutrado de la Partio kaj Maŭzedongpenso mi fariĝis inĝeniero de arbokulturo el ordinara arbisto. Sen la granda Komunista Partio de Ĉinio kaj la granda

gvidanto Prezidanto Maŭ, ne estus mi Ma Jongŝun kaj ne estus la belaj grandaj arbaroj de la Malgranda Hing-an-montaro.

La arbara regiono Jiĉun situanta en la Malgranda Hing-an-montaro estas unu el la ĉefaj arbaraj bazoj de nia lando. Jiĉun, kiun oni nomas arbara ĉefurbo, disvolviĝis de malgranda vilaĝo kun pli ol dek familioj en urbon de arbokulturo kun pli ol 600,000 loĝantoj. Ĝiaj laborantaj popolanoj diligente okupiĝas tutjare pri reforestumo kaj arboprodukto por la socialisma konstruado de nia lando.

La Malgranda Hing-an-montaro estas arba maro kun tre abunda riĉfonto. En pli ol 20 urboj kaj urbetoj de la tuta regiono, kiujn ligis 3 fervojoj, sin trovas grandaj lignotenejoj, en kiuj monte amasiĝas ligno; sur la specialaj fervojoj trairantaj la tenejojn, laboristoj tagnokte ŝarĝas kaj malŝarĝas vagonarojn per ligno. Ĉie prezentiĝas sceno de intensa laboro. En la arbozono mil liojn larĝa kaj longa


kreskas ruĝabioj, larikoj, piceoj, helonggiang-aj korkarboj, fraksenoj, ĉinaj poploj, betuloj, kverkoj, manĉuriaj tilioj kaj aliaj kelkdek specoj de arboj. Pro abundo de ĉiamverdaj ruĝabioj, la arbara regiono Jiĉun havas alian nomon de hejmlando de ruĝabioj. Ĉu sur la krutaj montoj, ĉu en ravinoj aŭ ebenejoj ĉie kreskas densaj arbaroj, nigre verdaj kaj pompe prosperaj. En la zono de praarbaroj, la kajoj de ĉielskrapaj ruĝabioj kvazaŭ verda kulvualo vualas la sunbrilon; la rektaj kaj dikaj trunkoj densas kiel muroj kaj baras la rigardon. Jen la abunda arba fonto de nia granda patrolando!

Kiam mi vidis belajn meblojn kaj plankon en la majesta Popola Halo en Pekino, kiam mi vidis fervojojn nove konstruitajn per grandaj kvantoj da ŝpaloj kaj reloj senfine sin etendantaj al diversaj lokoj de la patrolando, mi profunde sentas gloron kaj fierecon pro la kontribuo de la arbistoj al la socialisma patrolando! Kiam mi vidis la rapidan disvolviĝon de la arbara kemia industrio kaj sinteza

Juna forsto kreskas en praarbaro.



Ma Jongŝun instruas novajn motorsegilistojn en arbosegado.





Transportejo

utiligo de ligno, pinpinglan oleon en granda kvanto kaj glaceajn belajn lignofibrajn tabulojn, kiuj trovas vastan merkaton ekster nia lando, mi plie sentas feliĉon, ke mi estas arbisto de la nova Ĉinio!

Tamen, en la malnova socio, ĉar la Ĉiang-Kaj-ŝek-a banditaro lakee prezentis al la japana imperiismo la nordorienton de la patrolando, tiuj amindaj grandaj arbaroj trafis barbaran tretadon kaj frenezan rabadon de la japanaj rabistoj. La arbistoj laboris kiel sklavoj kaj spertis ĉian suferon kaj ofendon; multaj verdaj montoj estis nudigitaj.

Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la popolanoj de la arbara regiono iris al la kalvaj montoj kaj levis altan tajdon de reforestuma movado.

En la montoj Dajling kaj Nanĉa, kie la arbaro suferis seriozan detruon faritan de la japanaj rabistoj, por grandarea reforestumo ili starigis reforestumajn administrejojn kaj arbitajn bedojn. En printempo, post degelo de glacio kaj neĝo, la vastaj amasoj de reforestumaj laboristoj, instituciaj kadroj, instruistoj kaj lernantoj, junaj virinoj iris en grupoj al la montoj kun pioĉoj kaj ŝoveliloj por reforestumo. La montoj kovritaj de arbustoj kaj rampvegetaloj estis plenaj de ruĝaj flagoj kaj vigligitaj de kantoj. Oni elhakis lokojn por fosi kavojn kaj planti arbitojn eĉ ofte en vento kaj pluvo.

En 1958, sub la brilo de la ĝenerala linio ellaborita de Prezidanto Maŭ “**Streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie**”, rapide disvolviĝis ligno-

produkto de la arbara regiono. Laŭsezona produkto estis anstataŭigita per tutjara produkto. Inspirite de la ĝenerala linio, la arbohakistoj de la Kingŝan-a Arboproduktejo de la Arbara Administracio Vuminhe sukcese kreis sciencan regulon de “samtempa atento pri arbohako kaj reforestumo”, tiel multe mallongigis alternan periodon de arbohakado kaj kreis novan vojon por protekti arbaron kaj kontinuan produktadon. Por protekti arbitojn kaj konservi densecon de arbaro, la arbohakistoj ne timas laciĝon kaj ĉiamaniere faras decan hakon. Motorsegilisto Ma Ŝuting foje pretis segi unu grandan ruĝabion, kaj per kelkaj minutoj li povis faligi la arbon, sed en tiu tempo, li trovis ke en la faldirekto de la arbo estas prosperaj junaj ruĝabioj, kaj li tuj prenis hakilon por fari fendon al la arbego kaj poste enbatis kojnon en la fendon, pro kio li ŝvitis tra la tuta korpo kaj ŝanĝis la faldirekton de la arbo kaj tiel protektis la junajn arbojn. Li diris: “Ni volonte ŝvitis pli multe por kreskigi pli da arboj por la patrolando!”

Post la batala bapto de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la forstiga afero de la arbara regiono havigis al si pli novan disvolviĝon. La forsta areo ekde 1966 ĝis nun atingis 184% de tiu en la pasintaj 15 jaroj antaŭ 1966; en 1970 oni superplenumis la forstigan planon je 34% kaj kreis plej altan rekordon de forstigo en la historio. La arbitoj de larikoj, ruĝpinoj kaj ruĝabioj pli frue plantitaj en Dajling, Nanĉa, Haŭlianghe kaj Ginŝantun hodiaŭ jam fariĝis novaj pompaj ombraj arbaroj dense kovrantaj la montojn.

Impetas la Anŝan-a Fer-ŝtala Kompanio

Post la batala baptado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, impete disvolviĝas nia Anŝan-a Fer-ŝtala Kompanio. Firme tenante kiel ĉefĉeneron la batalon inter la du klasoj kaj la du linioj, la vastaj amasoj de la revoluciaj laboristoj puŝas la ardan tajdon de **“teno de la revolucio, stimulo de la produkto”** al pli kaj pli alta nivelo; kvazaŭ buntaj montfloroj teknikaj renovigoj floras en ĉiuj fabrikoj kaj minejoj de la kompanio.

La filozofia penso de Prezidanto Maŭ estas la radika movforto de la anŝan-aj laboristoj por efektiviĝi novan antaŭensalton en revolucio kaj produkto. Vive studante kaj vive aplikante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ, ili solvis unun post alia la kontraŭdirojn inter alta temperaturo kaj longtempa uzado de forno, bona kvalito kaj malmulta konsumo, multa ŝarĝo kaj rapida fandado ktp., kaj grandigis la ŝtalan produktokvanton. **“Prilaborante grandajn maŝinpecojn per malgrandaj ilmaŝinoj”** kaj **“reformante fremdlandajn ekipaĵojn per niaj propraj metodoj”**, la laboristoj de ferminejoj komplete renovigis ercoelektajn ekipaĵojn kaj levis la elektran kapablon. Per la revolucia spirito de penema luktado en malfaciloj, multaj fabrikoj kaj minejoj reformis ekipaĵojn kaj fabrikis multe da altnivelaj, precizaj kaj pintaj produktaĵoj.

La impeta disvolviĝo de la Anŝan-a Fer-ŝtala Kompanio vivece pruvis la saĝan konkludon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: **“La Granda Proletara Kultura Revolucio estas potenca movforto por disvolvi la sociajn produktajn fortojn en nia lando.”**




La Anŝan-a Fer-ŝtala Kompanio en nokto



Ordinara laborulo Vu
Ĉanghaj, bataliones-
tro de la Unua Ŝtala
Fabriko

Por produkti pli da
fero kaj ŝtalo, ni ne
timas ke nia ŝvito
flosigus ŝipon. Juan
Hongfa, la ĉeflabo-
risto de la 9-a marti-
na fornego en streĉa
batalo.






Akiru gloron por Prezidanto Maŭ, akiru gloron por la socialisma patrolando! Kun la flame ruĝa koro, la laboristoj senĉese produktis grandajn kvantojn da bonkvalita ŝtalo kaptante ĉiun sekundon.



Aspirante al prospero kaj potenco, la laboristoj de la Ferminejo de Orienta Anŝan kreis novan bormaŝinon, tiel ke duobliĝis la laborefiko.



Meteologia

Observado por la Revolucio

— Pri meteostacio de Ĉongzuo-gubernio de Guanghi

RESUMI PRAKTIKAN SPERTON DE LA AMASOJ

En nia meteostacio laboras sep kamaradoj kun meznombra aĝo de malpli ol 30 jaroj. Inter ni kelkaj studis meteologion en universitato kaj la aliaj lernis nur en teknika lernejo aŭ kurso iom da scioj pri meteologio kaj plejparto el ni forlasis lernejon kaj eklaboris en nia meteostacio en la dua jarduono de 1964 kaj mankis al ni praktika sperto. Kaj krome, pro venenado de la kontraŭ-revolucia reviziisma eduka linio, ni nur sciis legi librojn, superstiĉe kredis “specialistojn” kaj “aŭtoritatulojn”, malestimis praktikan sperton, havis en la cerbo multe da ideismaj kaj metafizikaj pensoj, kio multe malutilis al la laboro.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio ni multe progresis en politika konscio kaj levis nian memkonscion en transformado de mondkoncepto kaj en akiro de libero en meteologia servo per filozofia penso de Prezidanto Maŭ. Sekvante brilajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ, ni iris unuj post aliaj al kamparo, en la vastajn popolamasojn por akcepti reedukon por lerni kaj apliki praktikan sperton de veteranaj kamparanoj akiritan en observado de la veteraj fenomenoj. La nobla kvalito de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj senlime fideli al Prezidanto Maŭ kaj plene sindediĉi al la revolucio profunde edukis nin, tiel ke ni formetis la intelektulan fieremon kaj sincere akceptis reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ili trovis nian laboron bonvena. Iu malriĉkamparano kun la aĝo de ĉ. 70 jaroj diris al ni: “En la malnova socio mi ne eldiris mian sperton en observado de veteraj fenomenoj, por ke la bienuloj ne profitu el ĝi. Sed hodiaŭ, por la socia-

lisma konstruado de la patrio, ĉion mi diros al vi.” Li diris al ni pli ol 50 spertaĵojn en observado de veteraj fenomenoj, kio ludis gravan rolon en plibonigo de nia laboro. Ekzemple, laŭ lia spertaĵo de antaŭdiro de tempo kaj kvanto de pluvo ni faris kvin antaŭdirojn pri mezaj kaj fortaj pluvoj en la periodo de aprilo ĝis junio de 1969 kaj kvar el ili estas ĝustaj.

El praktikado ni pliapaŝe konis, ke la amasoj estas veraj herooj. Ni prenis malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel instruistojn kaj kolektis ĉe ili pli ol 340 spertaĵojn. Inter tiuj estas multaj agrikulturaj proverboj kaj multaj metodoj de observado de meteaj fenomenoj, ekzemple: sereniĝon ofte antaŭdiras densa nebulo kaj pluvon antaŭdiras transloĝigo de formikoj, elteriĝo de lumbrikoj, salto de kobitidoj el akvo kaj malalta flugado de libeloj. Kombinante sperton de la amasoj kun sciencaj scioj en libroj, ni multe altigis la ĝustecon de niaj meteologiaj antaŭdiroj. Dank’ al tio pli firmiĝis niaj decidoj kaj memfido en meteologia servo kun subteno de la amasoj. Ni starigis en nia gubernio 8 observajn grupojn konsistantajn el veteranaj kamparanoj kaj regule konsultas veteranajn kamparanojn.

Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “forigante la senvalorajn kaj prenante la esencajn, forigante la falsajn kaj konservante la verajn, procedante de ĉi tiu al tiu kaj de la supraĵo al la interno”, ni provis la spertojn de veteranaj kamparanoj en kombino kun la meteologiaj materialoj de nia meteostacio, forigis la feĉojn kaj eltiris la esencojn, kaj post “**praktiko, konado, denove praktiko, denove konado**”, ni trovis pli multe da leĝoj de vetera ŝanĝiĝo kaj akiris pli grandan liberon en meteologia laboro. Ekzemple, la 15-an de majo de 1969, en nia gubernio falis meza pluvo en tri sinsekvaj tagoj kaj tuj post tio aperis

fenomeno, ke tage estis varme kaj nokte malvarme kaj la diurna temperatura variado estis tre granda. Ni analizis la proverbon “se varme estas en tago kaj malvarme en nokto, sekigōs eĉ la maro” en kombino kun niaj meteologiaj materialoj kaj trovis, ke ordinare, inter majo kaj septembro, se post pluvo la diurna temperatura variado superas 10° C, do sekvos sekeco pro nesufiĉa pluvo. Post pluvo en la 18-a de majo la diurna temperatura variado superis 10° C kaj ni antaŭdiris sekecon kaj admonis la komunumojn kaj brigadojn konservi akvon. Poste efektive aperis sekeco. El tio ni pliapaŝe konis la bonon de resumado de praktika sperto de la amasoj per materiisma dialektiko.

VENKI TEKNIKAN MALFACILON


Kun disvolviĝo de la revolucio kaj produktado, gvidaj instancoj kaj la vastaj amasoj de malriĉkmparanoj kaj malsuperaj mezkmparanoj urĝe postulis de ni pli ĝustan antaŭdiron de katastrofa vetero kaj longtempan meteologian antaŭdiron, por ke ili povu ellabori taŭgan produktan planon. Ni decidis pliapaŝe studi bone kaj apliki bone la brilan filozofian penson de Prezidanto Maŭ, por venki la malfacilon en ĝusta antaŭdiro de malvarma ondo kaj tajfuno kaj en longtempa antaŭdiro.

Malvarma ondo estas tre malutila kaj danĝere minacas la ĝermadon de frua rizo. Por fari ĝustan antaŭdiron pri malvarma ondo, ni faris vastan enketadon ĉe veteranaj kamparanoj, provis la veteran proverbon “se furiozas suda vento, certe venos norda vento” en komparo kun niaj materialoj kaj trovis ke antaŭ malvarma ondo (norda vento) en Ĉongzuo-regiono ofte daŭras suda vento. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**kiel rezulto de sia interlukto la du kontraŭstaraj flankoj kontraŭdirantaj**

ĉiam turniĝas respektive en sian malon sub specifaj kondiĉoj”, ni firme kaptis la karakterizaĵojn de furiozeco de suda vento kaŭzitan de intensa lukto inter suda kaj norda ventoj nome varma kaj malvarma aermasoj, klopode serĉis kondiĉojn de turniĝo. Ni trovis, ke se en tago suda vento kun rapideco de pli ol kvar metroj en ĉiu sekundo daŭras 4-6 tagojn, do malvarma ondo influos Ĉongzuo-regionon. Sed en tia okazo, en iuj fojoj nur mallonge blovas norda vento kaj en aliaj fojoj aperadas malvarma kaj pluva vetero, kaj tia vetero daŭras longtempe kaj malutilas al printempa semado. Kiel fari ĝustan antaŭdiron pri tia vetero? Ni analizis kaj studis la agrikulturan proverbon “forta norda vento serenigas kaj forta suda vento pluvigas”, kaj per tio ni konis ke forta norda vento (forta malvarma ondo) forpelas la pluvnubojn, sekve malserena vetero ne povas longe daŭri; dum mala estas la kazo de suda vento. Post ripetada analizo kaj studo, ni trovis multajn kondiĉojn de reciproka turniĝo de la kontraŭdiro de varma kaj malvarma aero, kaj diversajn donitaĵojn por antaŭdiro de malvarma ondo kaj ĝia tempodaŭro, tiel ke multe altiĝis la pocentoj de ĝustaj antaŭdiroj.

Ĝuste antaŭdiri tajfunon kaj pluvegon post ĝi estas alia malfacila laboro antaŭ ni. En la lastaj kelkaj jaroj, kiam tajfuno influis Guanghi, ni trovis, ke iafoje en nia gubernio ventegis kaj pluvegis, iafoje ventegis sed ne pluvegis, iafoje pluvegadis sed ne ventegis kaj iafoje nek pluvegis nek ventegis. Kio estas la kaŭzo? Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj**”, ni ripetade provis la sperton de veteranaj kamparanoj en kombino kun la materialoj de nia stacio kolektitaj en la lastaj 12 jaroj kaj ekkonis, ke la grado ĝis kiu tajfuno influas Ĉongzuo ĉefe dependas de meteologiaj kondiĉoj de la lasta nome la internaj kaŭzoj. Ekzemple, antaŭ tajfuno, ju pli granda estas la absoluta humideco en tri sinsekvaj tagmezoj, des pli forta pluvo sekvos. En julio de 1969, kiam nia gubernio estis en intensa batalo kontraŭ sekeco, la meteologia observatorio de Guanghi antaŭdiradis ke pro influo de tajfuno en suda Guanghi estos meza aŭ forta pluvo kaj en iuj regionoj estos fortega pluvo. Ĉongzuo situas ĝuste en tiu parto, sed nia stacio konstatis ke la absoluta

Registro pri meteo





La kamaradoj de la meteostacio konsultas lokan maljunan kamparanon pri ties sperto en metea observado.


humideco estas tre malgranda kaj ne estas kondiĉoj por formiĝo de forta pluvo. Tial ni faris antaŭdiron de malforta pluvo kaj la fakto pruvis ĝian ĝustecon, kaj la batalo kontraŭ sekeco en la tuta gubernio estis levita al nova alta tajdo.

SERVI AL LA INDUSTRIO, AGRIKULTURO KAJ POPOLA VIVO

Prezidanto Maŭ instruas al ni: **“La ege grava problemo laŭ marksisma filozofio ne estas kompreni la leĝojn de la objektiva mondo kaj sekve povi ĝin klarigi, sed aktive reformi la mondon per la kono de la objektivaj leĝoj.”** Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, unuflanke ni pruvadis en praktikado de antaŭdiro la konon pri leĝoj de vetera ŝanĝiĝo kaj senĉese faras resumon pri niaj spertaĵoj; aliflanke per antaŭdiro ni rekte servas al la industria kaj agrikultura produktado kaj la popola vivo. Ni opinias, ke senutila estas la meteologia antaŭdiro, se oni zorgas nur pri “antaŭdiro” sed ne “aktuala utilo”. Laŭ specialaj bezonoj de industria kaj agrikultura produktado kaj aliaj profesioj, ni plibonigis nian antaŭdiron kaj ĝustatempe sciigis koncernajn departementojn pri ŝanĝiĝo de vetero. Iun matenon, en aŭgusto de la pasinta jaro, kiam oni intense okupigis pri someraj rikolto kaj semado en la kamparo, densiĝis plumbaj nuboj kaj pluvo ŝajnis falonta. Sed laŭ analizo de nia stacio pri la meteologiaj elementoj, la grizaj nuboj malaperos ĉ. la 9-a horo,

ekbrilos la suno, kaj pluvos nur post la 15-a horo. Ni do konsilis al la produktaj brigadoj, ke ili sunumu rizon por eviti perdon alportotan pro ebla ĝermado de grajnoj. Foje, amaso da varoj kuŝis senkovre ĉe fervoja stacio. Je la 23-a horo, ni trovis, ke pro abrupta ŝanĝiĝo de meteologiaj elementoj estos fulmotondro. Ni tuj sciigis al la stacio por ke oni faru necesajn aranĝojn kontraŭ pluvo. Post nelonge efektive pluvegis. Rizfarunaj vendejoj de nia loko devas pretigi rizfarunon en kvanto konforma al nombro de klientoj en malsamaj veteroj serena aŭ pluva; hoteloj devas lavi kaj sunumi litaĵojn en serena tago; oficejo de interligita trafiko devas difini laŭ vetero vojlinion por aŭtoj ironantaj al montregiono kaj decidi, ĉu tuj enstapligi la varojn alportitajn de la aŭtoj aŭ ne. Laŭ ilia aktuala bezono ni pli frue faris al ili specialan meteorologian antaŭdiron. Tio estas bonvena al la vastaj revoluciaj amasoj.

Retrorigardante la lastajn jarojn en kiuj ni transformis nian mondkoncepton kaj komandis la praktikadon de meteologia laboro per la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ni ĉiuj profunde komprenis: diligente vive studante kaj vive aplikante la filozofian penson de Prezidanto Maŭ kaj firme plenumante la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, ni povos iom post iom koni kaj mastri la leĝojn de vetera ŝanĝiĝo, akiri liberon en batalo kontraŭ la naturo kaj bone plenumi nian meteorologian servon por la revolucio.



Doktoro Ĉen Ĝongvej (la meza) esploras rekunigon de sangaj angioj kune kun ostologoj.

Nova Disvolviĝo de Tekniko en Replanto de Derompitaj Membroj

ĈEN ĜONGVEJ*

EN 1963, la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo sukcese replantis derompitan manon. Oktobre de la sama jaro, ĉina medicinisto faris raporton pri tio en la internacia konferenco de kirurgio okazigita en Romo kaj tio vekis grandan atenton de la ĉeestantaj kirurgoj de diversaj landoj. Ili opiniis, ke la sukcesa kunkudro de tute derompita mano, kiu ne nur tute reviviĝis sed ankaŭ restarigis siajn funkciojn en kelkaj monatoj, estas senprecedenca faro en la mondo. Kian novan disvolviĝon akiris la tekniko de replanto de derompitaj membroj, post tiu unua sukceso? Eble multaj legantoj deziras informiĝi pri tio.

En la pasintaj pli ol 7 jaroj, direktante nian praktikadon de replanto de derompitaj membroj per la brila filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ni atingis novajn sukcesojn. Nun ni povas sukcese replanti ne nur derompitan brakon kun neta vundo, sed ankaŭ derompitan membron kun elstaraj kaj pendaĵoj ĉe la vundo kiel rompita bambuo. Aparte menciinde estas, ke oni povas sukcese replanti de-

rompitan fingron, por kio malfacilega operacio estas bezonata. Nun oni jam povas sukcese rekunigi membron plejparte derompitan post 48-hora apartiĝo, kaj ankaŭ tute derompitan membron post 24-hora apartiĝo, se nur oni ĝin konservas per fridigo. Tiuj sukcesoj tute rompis la “konkludon” elpensitan de burĝaraj “aŭtoritatuloj”, ke “nesavebla estas membro al kiu sangoprovizo ĉesis je pli ol 6 horoj, kaj ĝi ne povas reviviĝi post replanto, eĉ se oni sukcesas restarigi la cirkuladon de sango”.

La disvolviĝo en replanto de derompitaj membroj ja estas akirita dank’ al la direktado de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ.

Ni prenu rekunigon de sangaj angioj kiel ekzemplon. La homo havas arteriojn kaj vejnojn, tra kiuj la koro faras sangan cirkuladon. La rolo de la arterioj estas liveri freŝan sangan oksigenozan al kapilaroj por fari materian interŝanĝon en la histoj, dum la vejnoj rekondukas el la kapilaroj saman kvanton de sango post materia interŝanĝo en la koron por garanti la iradon de metabolo en homa korpo per la cirkulado. Se la cirkulado de sango ĉesas, do la histoj ne povas funkcii en ordo, tiam la homo mortas kaj baldaŭ la membro trafas

**La verkinto estas kuracisto de ostaj malsanoj de la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo kaj ĉefa kuracisto en la unuafoja sukcesa replanto de derompita mano.*

nekrozon. Tial ĝusta kono pri la stato de la arterioj kaj vejnoj kaj bona rekunigo de la angioj por garantii sangan cirkuladon en derompita membro estas ŝlosilo por revivigi ĝin per replanto.

En la komenco, kiam ni faris operacion al la unua paciento de derompita mano, ni rekunigis al li saman nombron da rompita arterioj kaj vejnoj. En la sekvinta tago post la operacio, ni trovis ke la haŭto sur la replantita membro iom post iom ŝveliĝis. Kio estis la kaŭzo? Ni pensis, ke tio rezultigis el ellaso de sango post rompiĝo de nevideblaj kapilaroj pro vundiĝo de histoj. Sekve ni tranĉis la haŭton ĉe pluraj lokoj, por ellasi sangan, ricevis certan efikon kaj revivigis la replantitan membron. Poste ni rekunigis angiojn de alia vundito per la sama metodo. Post la operacio, ankaŭ la haŭto de lia rompita membro ŝveliĝis. Post entranĉo al la haŭto ĉe pluraj lokoj, la ŝvelo tamen ne malaperis kaj krome okazis ŝoko pro tio, ke granda kvanto da sango fluas el la vundoj. Kial la sama rimedo sukcesis ĉe la unua paciento kaj malsukcesis ĉe la dua?


Lerninte la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ, ke **“eraro ofte estas kondukanto de ĝusteco”** kaj **“multaj teorioj estas eraraj, kaj iliaj eraroj estas korektitaj tra la kontrolo de praktikado”**, ni akiris

pli grandan memfidon por batalo kaj decidis serĉi el la malsukceso faktoron de sukceso.

Ni retrorigardis la procezon de la operacio kaj faris konkretan analizon pri la konkreta afero. Kvankam ni same kunigis egalnombro rompitajn arteriojn kaj vejnojn por la du pacientoj, tamen ĉar la vejnoj de la unua paciento difektiĝis malpli serioze, tial sango povis facile trapasi post la rekunigo, la ŝveliĝo de la membro estis malserioza kaj efikis sur ĝi la tranĉoj de la haŭto. La vejnoj de la dua paciento serioze difektiĝis, estis malfacile rekunigi ilin kaj pro tio oni devis fari riparon, kio kiel kutime malvastigis la internon de la angioj kaj malfaciligis la trafluon de sango. Tial la membro ŝveliĝis serioze kaj ne efikis al ĝi la tranĉoj de la haŭto. Do estas evidente, ke grado de la ŝveliĝo strikte rilatas kun la vejnoj.

Inspirate de tiu malkaŝo, ni plue analizis la kontraŭdiron inter arterio kaj vejno: En arterio estas alta premo kaj la sango fluas rapide, dum en vejno estas malalta premo kaj la sango fluas malrapide. Sed la vejnoj estas pli multaj ol la arterioj. Laŭ tiuj kondiĉoj, relativa sangflua ekvilibro estas atingita inter ili. Se ni kunigas ne pli multajn sed egalnombrajn vejnojn en komparo kun la kunigitaj arterioj, do certe rezultigis el tio nesufiĉeco de reflua sango en la vejnoj.

Doktoro Ĉen Ĝongvej (la meza) parolas pri la apliko de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ por direkti replantadon de derompitaj membroj.



Laŭ tiu ĉi kono, ni intence kunigis pli multajn vejnojn, kiam ni poste faris replanton de membro, por faciligi la refluan de sango tra la vejnoj, tiel forigis ŝveligon kaj multe altigis la reviviĝan procenton de replantitaj membroj.

En la praktikado de replanto de derompitaj membroj, ni ekkonis, ke la derompita membro ne tuj mortas post apartiĝo de la homa korpo. La ĉeloj en la histoj mem povas daŭrigi la metabolon utiligante la restantan nutraĵon en la histoj. Kiel mastri la leĝon en la metabolo de la histoj interne de derompitaj membroj kaj altigi la reviviĝan procenton de derompitaj membroj al kiuj longe ĉesis provizo de sango? Instruo de Prezidanto Maŭ lumigis nian penson. Prezidanto Maŭ diris: **“La movado de ĉiaj objektoj montriĝas en unu el la du statoj: relativa senmoveco kaj evidenta ŝanĝiĝo Kiam la movado troviĝas en la unua stato, ĝi ŝanĝiĝas nur kvante, sed ne kvalite, kaj sekve sin montras ŝajne senmova.”** Ni opiniis, ke ankaŭ en la movada leĝo de la vivo de la histaj ĉeloj estas procezo de ŝanĝo kvanta al ŝanĝo kvalita. Se ni alprenas konvenajn aranĝojn kaptante la okazon kiam kvanta ŝanĝo ankoraŭ ne estigis kvalitan ŝanĝon, por maksimume malaltigi la metabolan rapidecon kaj tiel plenumi la minimuman postulon por teni la vivmovon de la membro kaj longigi ĝian vivon, aŭ krei kondiĉojn por provizo de nutrado al la ĉeloj por bonigi ĝian staton, do ni povas krei favorajn kondiĉojn por sukcesigi replanton de derompitaj membroj.

Foje, ni akceptis pacienton, al kies derompita brako sangprovizo ĉesis por tempo de 24 horoj. Dum transportado de li sur la vojo, oni konservis la derompitan membron per sako da glacio. Dum la kuracado, ni daŭre tenis ĝin en malalta temperaturo kaj faris al ĝi specialan nutradon. Post tri tagoj, iom post iom varmiĝis la membro kaj sukcesis la replanto de tiu derompita membro.

La procezo de la disvolviĝo de la tekniko en replanto de derompitaj membroj estas ankaŭ procezo de batalo inter la proletara kaj burĝara ideologioj.

En la jaro 1958, laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ pri nepra kombiniĝo de intelektuloj kun laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ni iris en fabrikojn kaj kamparon por partopreni la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado kaj akcepti reedukon fare de la laboristoj kaj kamparanoj. Dank’ al kombiniĝo kun laboristoj kaj kamparanoj ni komprenis el niaj propraj spertoj, ke la grandaj

venkoj akiritaj en la socialisma konstruado de nia lando estas ĝuste frukto akirita de la vastaj amasoj de laboristoj kaj kamparanoj per sinforĝesa laborado kiuj armas sian cerbon per Maŭzedongpenso. Iom post iom ni kulturis en ni profundan amon al la laboristoj kaj kamparanoj, kaj post reveno al la hospitalo ni komencis klopodon por preventi kaj kuraci vundojn de manoj. En la pasintaj kelkaj jaroj, ofte en ni luktis pensoj fari operacion por replanto aŭ ne, kiam ni renkontis malfacilojn en tekniko. Foje ni faris operacion al laboristo, kies brako serioze deŝiriĝis. Kvankam ni faris multe da klopodoj, aplikinte ĉiujn medikamentojn uzendajn kaj alpreninte rimedojn disponeblajn, tamen ni ne povis ĝin rekunigi. Ĉu ni daŭrigu replanton aŭ ne, vizaĝe al la grandaj malfaciloj? En nia cerbo iris intensa lukto. Tiam ni ripetade lernis jenan instruon de Prezidanto Maŭ: **“Se ili ekposedas sian sorton, sekvas la marksism-leninisman linion kaj ne evitas problemojn, sed aktive solvas ilin, ĉiu ajn malfacilo en la mondo estas solvebla.”** El ĝi ni ricevis grandan kuraĝigon. Kamaradoj diris, ke la mano apartenas al frato-laboristo kaj ni devas turni la esperon en cent-pocentan efektivon, eĉ se ĝi estas nur centona. Sekve ni faris analizon kaj esploron pacience, faris unu provon post alia kaj finfine sukcesis revivigi la brakon de la frato-laboristo.


Replanto de fingro estas tre malfacila operacio. La angietoj en la fingroj dikas nur kvarone de alu-metdikeco. En la komenco ni ne havis sufiĉan memfidon pro malsukceso de rekunigo de ili. Iu paciento demandis al ni: **“Se derompita mano estas replantebla, kial vi ne povas replanti al mi la derompitan fingron?”** Kun tiu demando ni serioze lernis la instruon de Prezidanto Maŭ pri ekskluziva kaj senrezerva servado al la popolo, kritikis la reviziisman linion de Liu Ŝaŭki en higiena laboro kaj strebis al ĉiam pli alta nivelo en tekniko. Finfine ni sukcesis rekunigi la maldikajn angiojn en derompita fingro de paciento per kudrilo nur 0.2 milimetron dika kaj nilona fadeno dika je triono de la dikeco de haro kaj revivigis lian replantitan fingron.

En la lastaj kelkaj jaroj, ni faris iujn laborojn farendajn por la popolo. Sed neniam ĉesos la batalo de la homaro por transformi la objektivan mondon kaj neniam finiĝos la transformado de nia mondkoncepto. Ni decidis preni la jam atingitan sukceson kiel novan startpunkton por daŭra revoluciado kaj klopodas pliapaŝe mastri la objektivan leĝon en replanto de derompitaj membroj por servi al la popolo ankoraŭ pli bone.

Fervojkonstrua

Batalanto

Hiang Vangkun



Batalantoj de fervojkonstruaj trupoj faras mezuradon.

EN iu el la komencaj tagoj de somero falis pluvego. Sur iu pontokonstruejo, laboristoj streĉis siajn fortojn en farado de ferbetonaj pilieroj. Inter la homamasoj unu juna ĈPLA-ano laboris aparte energie. Li navede iris kaj reiris puŝante ĉareton por alporti betonon sur alte transportanta tabulego. Li senĉese kantis kantojn kun tekstoj de vortoj de Prezidanto Maŭ por kuraĝigi la aliajn. Ŝvito kaj pluvo tramalsekigis lian kostumon, sed li kvazaŭ tute ne sentis tion.

“Kamarado Hiang, lasu al ni la laboron en

alteco, kaj vi malsupren iru!” diris al li zorgeme laboristoj.

“En konstruo de pontoj kaj vojoj por la socialismo, ankaŭ mi devas kontribui,” respondis la juna batalanto de ĈPLA ne ĉesante en sia laboro.

Tiu batalanto estas kamarado Hiang Vangkun el iu trupo de la fervojkonstruaj trupoj, veninta al la pontokonstruejo por subteni la maldekstrulojn.

Dum la interparolo, venis kamarado Jang, la estro de la revolucia komitato de la direkcio de

pontokonstruado. Ĉi tie la montoj estas krutaj kaj tre altaj, la ponto estas viadukto transpontanta inter du montoj, la pilieroj altas pli ol 20 metrojn. La alta, improvizita ponto el tabulego jam tramalsekiĝis, kaj irante sur ĝi oni devis esti tre singardemaj. Vidinte tion kamarado Jang haste kriis laŭte: "Kamarado Hiang Vangkun, en pluvego la vojo estas glita. Vi havas artefaritan kruron; prefere faru ion malsupre!"

Aŭdinte tion, ĉiuj laboristoj ekmiregis. Tiu kamarado ĈPLA-ano, kiu venis por subteni la maldekstrulojn, laboras vigloplene kun ili jam de pluraj tagoj, kaj neniu pensis, ke li havas artefaritan kruron!

Hiang Vangkun estas subplotonestro de iu trupo de la fervojkonstruaj trupoj. En printempo de 1969, li plenumis foslaboron en iu loko, kie senĉese okazis defaloj de ŝtonoj. Hiang Vangkun ĉiam iris antaŭ la aliaj por forigi danĝerajn defalontajn ŝtonojn kaj firmigi la subtenan barilon kreante kondiĉojn por ke la kamaradoj povu labori en sekuro. Iun tagon, veninte al la laborloko kaj post studo de vortoj de Prezidanto Maŭ kune kun la kunbatalantoj, Hiang Vangkun ekprenis sian pneŭmatikan drilon kaj laboris energie. Kiam preskaŭ finiĝis la deĵoro, li vidis grandan ŝtonon elŝoviĝintan supre sur la hakita montmuro. Li pensis en si: La ŝtono malhelpos laboron de la sekvonta deĵoro, se mi ĝin ne forigos; mi nepre ĝin faligu! Li do turnis sin al ĝi kun la drilo. Subite, de sur la muro defalis ŝtonetoj senĉese, fendoj aperis ĉirkaŭ la ŝtonego.

"Foriru! Minacas defaloj!" laŭte kriis Hiang Vangkun.

Sed kvin batalantoj tion ne aŭdis kaj ankoraŭ streĉe laboris en la danĝera loko. Brulante de maltrankvilo, li rapide sin ĵetis antaŭen kaj ilin forpuŝis. En tiu palpebrumo, "bum", la ŝtonego defalis kaj puŝegis Hiang Vangkun surteren, tiel ke rompiĝis al li la maldekstra kruro kaj estis kaŭzita al li pli ol dek kontuzoj.

Hiang Vangkun enhospitaliĝis. Liaj superuloj kaj kamaradoj ofte lin vizitis kaj konsolis. Kiam kamaradoj parolis pri lia nobla ago sinoferi por savi aliajn, li ĉiam diris: "Pro la interesoj de la popolo, mi ne domaĝas eĉ mian vivon. Mi ja faris nur kion mi devas fari!"

Ĉar la vundo de lia maldekstra kruro estis serioza, kuracistoj devis ĝin amputi.

Post la operacio, akran demandon li alfrontis: Ĉu li atendu facilan vivon, kiun la superuloj aranĝos

por li, aŭ venku la malfacilojn por daŭre revolucii? Kun tiu demando Hiang Vangkun denove studis la brilajn "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. La absoluta senegoismo de kamarado Bethune forte lin kortuŝis.

"Homo povas havi grandan aŭ malgrandan kapablon, sed sole kun tiu spirito, li jam estas homo nobla, pura, bonvirta, libera de trivialaj interesoj kaj utila al la popolo."

Ĉiu el la vortoj de la granda instruo de Prezidanto Maŭ vibregis lian koron kaj kiel disradianta lumturo montris al li la direkton antaŭen. Li pensis en si, ke li estas kompartiano kaj ĵuris batali dum la tuta vivo por la komunismo. Nun, kvankam li ne povas okupiĝi pri iuj aferoj pro perdo de unu kruro, tamen ankoraŭ restas multaj aliaj aferoj por li fareblaj. Li ankoraŭ havas la dekstran gambon kaj povas servi daŭre al la popolo. Li decidis reveni al sia trupo.

Post kiam oni instalas al li artefaritan kruron, li ĝoje revenis al sia trupo. La superuloj asignis al li laboron de postfronta servo. Kiam ili demandis pri lia opinio, li senhezite diris: "La batalantoj de Prezidanto Maŭ pleje aŭskultas vortojn de la Partio. Mi firme obeas la decidon kaj garantias bone fari mian laboron." De tiam Hiang Vangkun vigle batalas denove sur la nova laborposteno.

Hiang Vangkun neniam povis forgesi la damnindan malnovan socion. Kiam li laboras kaj etendas sian dekstran manon, li tuj vidas la cikatrojn de mordvundoj kaŭzita de hundo de bienulo kiam li almozpetis dum sia infaneco. Kuŝante en sia lito, li ofte rememoras la tragedian scenon de la disfalo de sia familio kaj morton de siaj karuloj sub la tiranado de bienuloj. Ĉe penso pri la suferita klasa maljusteco, kreskas al li ĝisosta malamo kontraŭ la klasaj malamikoj. Pensante pri la hodiaŭa feliĉa vivo kaj bonfaroj de la Partio kaj Prezidanto Maŭ, li ekhavas forton neelĉerpeblan kaj pli firman decidon strikte sekvi Prezidanton Maŭ por fari revolucion dum la tuta vivo.

Pro tio, li decidis sin ekzerci kun la artefarita kruro por reakiri la lertecon de marŝado. Ĉu en vento kaj pluvo, aŭ en neĝo kaj sur glacio, laŭ la efektivaj bezonoj de milito li ĉiam sin ekzercis obstine. Mane alkroĉante rokojn, li grimpis sur krutan deklivon de 50-60 gradoj. Post kelkaj monatoj, li jam kapablis unuspire iri montvojon de 60-70 lioj.

Poste, la superuloj nomis lin estro de la sesa subplotono de iu trupo kaj ordonis ke li gvidu la-

boran grupeton al konstruejo de iu ponto por plenumi la taskon subteni la maldekstrulojn.


Veninte al la konstrua loko, li profunde sentis ke la tasko estas grava. Li pensis en si, ke la Partio asignis al li la taskon de subteno al la maldekstruloj en tiel granda konstruejo, kaj ke se li ne bone plenumus la laboron, tio signifus ke li vanigas la esperon de Prezidanto Maŭ kaj la popolo. De tiam li pli diligente vive studis kaj vive aplikis verkojn de Prezidanto Maŭ por direkti siajn agojn per Maŭzedongpenso. En laboro, kie multis malfaciloj, tien li iris; kie estis danĝero, tien li alrapidis.

Iun tagon, dum konsiliĝo pri laboro kun kamaradoj de la revolucia komitato, Hiang Vangkun informiĝis ke la transporta efiko de vagonetoj estas nealta kaj tio malbone influas la progreson de la laboro. Post la kunsido, li tuj iris al la konstruejo.

Tien veninte, Hiang Vangkun esploris la kaŭzon kaj trovis ke pro miksiĝo de akvo, ŝlimo kaj ŝtonetoj la ŝarĝoj gluiĝas al la vagonetoj, tiel ke ili ne povis esti plene malŝarĝitaj. Por trovi solvon, li puŝis vagonetojn kune kun laboristoj. Por tion fari, oni ĝenerale krcĉas ambaŭmane la randon de vagoneto kaj puŝkuras post ĝi. Sed la vagoneto glitis rapide sur la reloj, Hiang Vangkun ĝin sekvis tre malfacile. Tamen la malfacilo ne timigis la firman komuniston. Li sin ekzercis senĉese puŝante la vagoneton, lia lerteco kreskis kun ĉiu fojo. Kaj fine li eltrovis rimedon por plene malŝarĝi. De lia ago la laboristoj estis multe kuraĝigitaj.

La laboristoj varme laŭdis la firman revolucian volon de kamarado Hiang Vangkun, kaj li diris, ke Maŭzedongpenso nutras lin dum lia maturiĝo kaj ke li dediĉos ĉiun minuton kaj ĉiun sekundon de sia vivo al la Partio.”

Heroaj soldatoj de la fervojkonstruaj trupoj batalantaj en altaj montoj



Nova Fizionomio de

Liuĝoŭ-stacio

EN nia granda socialisma patrolando senĉese aperas novaj homoj, novaj aferoj kaj novaj moroj. La laborantoj de la Liuĝoŭ-a Fervojstacio de Guanghi vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson kaj tutkore servas al la popolo. Tial la stacio estas glorie nomata de pasaĝeroj kiel “bona popola stacio”.

“PASAĜERA GVIDILO”

La Liuĝoŭ-a Fervojstacio situas en regiono de nacimalplimultoj de Guanghi. Inter la pasaĝeroj sin trovas nemalmultaj popolamasoj de la naciecoj ĝuang, mjaŭ, jaŭ, molaŭ, maŭnan kaj aliaj.

Iun tagon, iu ĝuang-nacieca virino kun du infanoj eniris en la stacion, vektoportante pakaĵojn. Rimarkinte tion, servantino iris al ili kaj transprenis la pakaĵojn kaj kondukis ilin en la atendan ĉambbron por patrinoj kun infanoj. Kiam la servantino demandis ŝin pri ŝia celloko, pro la lingva baro ili ne povis kompreni unu la alian. Feliĉe aliris kamarado scipovanta la ĝuang-an lingvon; dank’ al lia interpreto la servantino sciigis ke la pasaĝero volas veturi per tiutaga ekspreso al Gujjang por viziti sian edzon. Trovinte ke restas nur 10 minutoj ĝis la ekiro de la vagonaro, la servantino tuj rapide faris por ŝi necesan aranĝon kaj kune kun aliaj portis la infanojn kaj pakaĵojn por helpi ŝin ascendi la vagonaron.

Tio vekis varman diskuton inter la servantinoj. Ili diris: “Ni ne nur devas entuziasme propagandi Maŭzedongpenson al pasaĝeroj kaj ilin servi, sed ankaŭ devas lerni ofte uzatajn vortojn de nacimal-

plimultoj por pli bone servi al la popolo.” “Ekde tiam ili lernis ofte uzatajn vortojn dum servado al pasaĝeroj. Krom lernado en laboro ili lernis reciproke ankaŭ dum ripoza tempo kaj rapide ellernis ofte uzatajn vortojn de nacimalplimultoj. Post certa tempo servantinoj prezentis al si novan problemon. Ili diris: “Ni helpis pasaĝerojn solvi malfacilojn en la stacio. Kiel tamen solvi iliajn lingvaj malfacilojn en vagonaro?” Post sufiĉa diskuto ili trovis bonan metodon: Skribi “referencon” al pasaĝeroj. La servantinoj antaŭdemandis ĉiujn pasaĝerojn ne sciantajn ĝeneralan han-an lingvon aŭ havantajn ian apartan malfacilon, de kie ili venis, kien veturos kaj kie descendos, kion ili faros dum vojaĝo, ili klare notis sur la “referencon” por ke tiuj ricevu prizorgon survoje. Tiu metodo ricevis laŭdon de pasaĝeroj. Ili nomas ĝin “pasaĝera gvidilo”.

SENPAGA RIPARO

La laboristoj de la pakaĵoficejo de la stacio ofte rimarkis iujn pakaĵojn aŭ kestojn nebone pakitajn kaj iujn eĉ kun ligŝnuroj malstreĉiĝintaj. Pro tio ili estis tre maltrankvilaj. Kun tiu demando ili ripetade studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**Nia devo estas respondeci al la popolo**” kaj diris unuvoĉe: “Ni devas ne nur zorge kaj ĝustatempe en- kaj el-vagonigi pakaĵojn de pasaĝeroj, sed ankaŭ garantii ke pakaĵoj estu sendifekte transportitaj al celloko.” De tiam la tri grupoj de la pakaĵoficejo starigis po instrumentan keston. En ordinara tempo ili kolektis ĉiun pecon da drato aŭ ŝnuro, forĵetitajn najlojn kaj metis ilin en la kestojn. Dum laboro, rimarkinte iun pakaĵon difektitan,

ili tuj najlis ĝin kaj religis ĉiun malstreĉitan pakadon. Maljuna laboristo Giang Jinhing prenis precipe de sia hejmo veltolan saketon kun tenajlo, martelo, tondilo, ŝraŭbturnilo kaj aliaj, kaj kunportis ĝin ĉie. En tempo de ripozo li kontrolis en la tenejo pakadon kaj riparis la difektitajn.

Iufoje, iu kamarado ĈPLA-ano alvenis por transsendi du kestojn da medikamentoj. Rimarkinte lian pakadon ne sufiĉe firman, majstro Giang elprenis martelon kaj najlojn kaj bone najlis por li la kestojn. Post tio li ligis ilin per dika ŝnuro, donis al la ĈPLA-ano lignan stangon kaj diris: “Kun ĝi vi povos facile vektporti la kestojn al via trupo post atingo de via stacio.” La ĈPLA-ano emociite diris: “Majstro laboristo, vi faris por mi kion mi eĉ ne pensis, mi nepre lernos de vi.” En la lastaj jaroj, majstro Giang riparigis por pasaĝeroj pli ol 15,000 pakadon krom plenumo de la ŝarĝa kaj malŝarĝa tasko asignita al li de la Partio kaj la popolo.

“TUTKORE SERVI AL LA POPOLO”

Iun posttagmezon somermeze, iu kamarado alvenis por transsendi 10 kuvojn da alvuso. Sed la posttagmeza vagonaro jam estis plene ŝarĝita, do la alvuso devis esti transportata per nokta vagonaro. Grupestro Tang Ŝihi en deĵoro pensis en si: La centmiloj da fiŝidetoj estas ŝtata posedaĵo kaj suferos damaĝon pro longa atendo sur perono. Li do kune kun kamaradoj prizorgantaj la alvuson iris por kontroli kaj trovis ke fiŝidetoj unuj post aliaj leviĝas supren kaj eble mortos. Unuflanke grupestro Tang proponis veturi per posttagmeza vagonaro kaj aliflanke konsiliĝis kun kamaradoj de la stacio pri solvo de transporto de la alvuso.

Por transporti la alvuson oni devis aldoni plian vagonon, sed la vakantaj vagonoj estis sur la kvara trako. La manovra lokomotivo post plenumo de la tasko jam reiris por ricevi karbon kaj akvon. Restis ĝis ekveturo nur pli ol 40 minutoj, sed sen manovra lokomotivo kiel oni povas kroĉi vagonon al vagonaro? Grupestro Tang konsiliĝis pri tio kun la aliaj kamaradoj, kaj ili ĉiuj diris unuvoĉe: “Por ke la ŝtata posedaĵo ne suferu damaĝon, sen manovra lokomotivo ni ankaŭ garantios ĝustatempan ekveturon de la vagonaro puŝante vagonon per niaj ŝultroj kaj manoj.” Dirite, farite. Ili unuanime puŝis la vagonon 30 tunojn pezan pli ol 1,000 metrojn, permane kroĉis ĝin al la vagonaro kaj antaŭtempe plenumis la ŝarĝan taskon. La kamaradoj prizorgantaj la alvuson emociite diris al la laboristoj: “Vi ja tutkore servas al la popolo!”



Servantino de la stacio transdonas al vagona servantino la gvidilon skribitan por la avino.

La maljuna laboristo Giang Jinhing flikas pakadon de pasaĝeroj.





LA ARMEO KAJ POPOLO DE NORDA VJETNAMIO FORTE BATIS LA USONAJN AERBANDITOJN

En la 21-a kaj 22-a de novembro 1970, la usona imperiismo sinsekve elsendis grandajn nombrojn da aeroplanoj en la teritorian aeron de la Vjetnama Demokratia Respubliko, por barbare bombadi multajn loĝkvartalojn kaj ekonomiajn konstruaĵojn en Vinh Linh, Quang Binh, Ha Tinh, Hajfongo, Son La, Vinh Phuc, Ha Tay kaj la ĉirkaŭaĵo de la ĉefurbo Hanojo, mortigis kaj vundis multajn loĝantojn, kreante novajn krimojn kontraŭ la vjetnama popolo.

La heroaj armeo kaj popolo de Vjetnamio brave leviĝis al batalo kaj donis meritan punon al la usonaj aerbanditoj. Ili faligis 6 usonajn aeroplanojn kaj tiel faris novan kontribuon.

La nova milita provoko de la usona imperiismo al la norda parto de Vjetnamio vekis ekstreme

grandan indignon ĉe la grandnombraj milicanoj kaj memdefendaj trupoj tie. Ili aktive ekagis kaj plifortigis siajn militajn preparojn kaj estas pretaj en ĉiu momento frakasi en kunagado kun la popola armeo ĉiun militan aventuron de la usona imperiismo.

LA UNUA VENKO DE LA LAOSAJ ARMEO KAJ POPOLO EN LA SEKA SEZONO

La 28-an de oktobro 1970, la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kolektis dek batalionojn por ataki la liberigitan regionon Muong Phine de la provinco Savannakhet, intencante turni tiun strategian regionon en saltotabulon por detruo la revolucion movadon en la suda parto de Laoso, minaci la naciliberigan aferon de suda Vjetnamio kaj la emancipan movadon de la khmera popolo. La patriotaj armeo kaj popolo de Savannakhet brave rezistis, kaj en batalo de nur dek tagoj, ekstermis 250 malamikojn, faligis 2 malamikajn aeroplanojn kaj frakasis la "mordetan" ofensivon de la usona imperiismo kaj ĝiaj lakeoj.

En tuta novembro ĉ. 1,400 malamikoj estis ekstermitaj kaj 12 usonaj aeroplanoj faligitaj.

Batalanto de la Laosa Popola Liberiga Armeo eskortas militkaptitojn.




Alte Teni la Flagon de “Firma Decido Batali kaj Venki”


Disvolvante la sentiman revolucian heroismon en la nacisava milito kontraŭ la usona imperiismo, la heroa vjetnama popolo brave batalas tute sen timo al vivofero kaj draŝe batas la usonajn agresantajn rabistojn, donante por la revoluciaj popoloj de la mondo brilan ekzemplon de batalo kontraŭ la usona imperiismo.

Nun, sekvante la instruon testamentitan de la granda gvidanto de la vjetnama popolo Prezidanto Ho Chi Minh, la vjetnamaj armeo kaj popolo brave marŝas antaŭen alte tenante la flagon de “firma decido batali kaj venki” por komplete venki la usonajn agresantajn rabistojn kaj realigi la reunuiĝon de sia patrolando!



La vjetnama popolo decidis pli brave batali por plenumi la testamenton de Prezidanto Ho Chi Minh. Komandantoj kaj batalantoj de iu roto, kiu estas honorata en sinsekvaj jaroj per la titolo “Firma Decido Batali kaj Venki”, diras: “Nur se ni vivas, ni persiste gardos la batalan pozicion kaj decideme batalos kontraŭ la usonaj rabistoj ĝis la plena venko.”






La brilo de la orstela ruĝa flago lumigas ambaŭ bordojn de la rivero Ben Hai, kuraĝigante milionojn de vjetnamaj popolanoj en brava batalo por ĝisfunde fiaskigi la usonajn agresantojn.

Triumfe revenas heroo de la vjetnama popola aer-armeo kamarado Le Hai kiu faligis kvin usonajn rabistajn aviadilojn.

Kaverna fabriko konstruita de la vjetnama popolo en la tagoj de la brulanta milito por subteni la nacasavan militon kontraŭ la usona imperiismo.





Batalanto de la heroo Vjetnama Popola Armeo



La popolanoj de la vilaĝo An Thuy de provinco Quang Binh en la norda parto de Vjetnamio unuflanke entreprenas produktadon, aliflanke batas la usonajn aerajn rabistojn. En la nasisava milito kontraŭ la usona imperiismo, ili paffaligis du usonajn rabistajn aviadilojn kaj tiel faris kontribuon por fiaskgi la "aeran superecon" de la usona imperiismo.




Sidante sur bomba ŝelo de la usona imperiismo, vjetnamaj junulinoj plenan de revolucia optimismo laŭte kantas kanton pri nasisavo kaj rezisto kontraŭ la usonaj agrezantoj.



Jen estas nerompebla ponto sur transporta linio en la norda parto de Vjetnamio. En ĝia ĉirkaŭaĵo, 99 usonaj rabistaj aviadiloj estis paffaligitaj de la vjetnamaj armeanoj kaj popolanoj. Nun, la ponto kuŝas majeste kiel antaŭe super la rivero, kaj sur ĝi iras transportado seninterrompe.

Por venki la usonajn rabistojn, la heroa vjetnama popolo rapide konstruis bezonatajn pontojn kaj ŝoseojn sur ruinaĵoj por garantii seninterrompan trafikadon inter la nordo kaj la sudo.



Fremdlandaj Amikoj

Varme Laŭdas la Revoluciajn

Modelajn Teatraĵojn

SPEKTINTE la revoluciajn modelajn teatraĵojn en nia lando, nemalmultaj fremdlandaj amikoj varme laŭdis, ke ili estas floroj de la proletaraj literaturo kaj arto kiuj radias per la brilo de Maŭzedongpenso.

PROSPERE FLORAS LA PROLETARAJ LITERATURO KAJ ARTO SUR LA ĈINA SCENEJO

Post spekto de la revolucia moderna baledo *Ruĝa Virina Taĉmento* kaj la revolucia moderna pekinopero *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*, iuj amikoj el eŭropaj landoj tre admiris ilian arde revolucion enhavon kaj la bonegan arton de la ludantoj. Iu amiko diris: “Vu Kinghua, heroino en *Ruĝa Virina Taĉmento*, per firmaj kaj fortaj dancmovoj kaj indigna mieno akuzis la krimojn de la malnova socio. Ŝi estas elstara reprezentanto de la ĉinaj virinoj kun forta ribelemo.” Alia amiko emocie diris: “Mi vizitis multajn landojn de la mondo kaj tie rigardis multajn teatraĵojn, sed mi neniam spektis tiajn teatraĵojn plenajn de revolucia spirito kaj prezentitajn kun eminenta

arto. En la kapitalismaj landoj, sur la baleda scenejo prezentigas nur sensencaĵo, kiu kvazaŭ narkotaĵo dekadencigas la homan spiriton. Sed sur la ĉina scenejo regas plena freŝeco kaj estas prezentataj kaj prikantataj heroaj figuroj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Jang Zijong en *Sagaca Kapto de la Tigra Monto* kaj Hong Ĉangking en *Ruĝa Virina Taĉmento* ja estas eminentaj reprezentantoj de la ĉina proletaro. Tiuj du modelaj teatraĵoj profunde spegulas ilian grandan idealon por frakasi la malnovan mondon kaj liberigi centmilionojn da suferantaj popolanoj.” Li kun profunda sento diris ankaŭ: “La revoluciaj modelaj teatraĵoj kuraĝigas homojn kaj instigas ilin batali kiel Jang Zijong kaj Hong Ĉangking por renversi la malnovan socion kaj la sistemon de ekspluatado de la homo per la homo. Sub la komando de kamaradino Giang King, la ĉinaj literaturaj kaj artaj laborantoj post penema luktado forlavis la venenaĵojn postlasitajn de la malnova socio sur la scenejo tiel ke brilaj floroj de la proletaraj literaturo kaj arto pompas sur la ĉina literatura kaj arta scenejo. Tio estas granda venko de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ Zedong!”

LA REVOLUCIAJ MODELAJ TEATRAĴOJ ESTAS TREZOROJ DE LA LABORANTA POPOLO


Iun tagon, vizaĝe al la matena suno maljuna maristo el la sudorienta Azio staris ĉe balustrado de ferdeko kaj absorbite aŭskultis la kanton el la revolucia modela teatraĵo *Ruĝa Signal-lanterno* "Mia Tuta Korpo Ekpleniĝas de Kuraĝo kaj Heroec'" disaŭdigatan de megafono de nia doko. Li aŭskultis kaj aŭskultis kaj pretervole ekbatis takton per la manoj. Momenton poste, rimarkinte ĉinajn amikojn starantajn apud li, li gastame invitis ilin en sian kajuton kaj poste elprenis ekzempleron de *Fortepiana Muziko "Ruĝa Signal-lanterno" kun Kantado de Pekina Opero* kun teksto en la angla lingvo kaj petis ilin kanti pecon el ĝi. Plenumante lian peton kelkaj ĉinaj amikoj ekkantis. Apenaŭ finiĝis la kanto, li ekmanklakis kaj laŭdis: "Brave, brave!" Tenante magnetofonon alia maristo diris: "Kiel bone estus, se mi ellernos unu el la elektitaj kantoj de la ĉinaj revoluciaj modernaj pekinoperoj!" Diveninte lian intencon la ĉinaj amikoj tuj alportis gramofonan diskon de elektitaj kantoj el *Ruĝa Signal-lanterno* el la Marista Klubo por ke li transregistru. Registrante la lasta diris ĝoje: "Bonege! bonege!" Tiu maristo diris interalie al la ĉinaj amikoj: "En nia lando troviĝas nur naŭzaj kaj dekadencaj muzikaĵoj, kiuj venenis multajn homojn. La ĉinaj revoluciaj modelaj teatraĵoj vere enkorpegis la instruon de Prezidanto Maŭ Zedong: 'Nia celo estas por fari literaturon kaj arton konsistiga parto de la tuta revolucia maŝino, fari ilin potenca batalilo por unuigi kaj eduki la popolon kaj por bati kaj ekstermi la malamikon, kaj helpi la popolon batali kontraŭ la malamiko unukore kaj unuanime.' Ili aŭdigas la senton de la laboranta popolo kaj esprimas la deziron de ni proletaro, kaj ili estas trezoroj de la laboranta popolo."

Post rigardo de la filmo *Fortepiana Muziko "Ruĝa Signal-lanterno" kun Kantado de Pekina Opero* iu japana maristo emocie diris: "Mi vidis la noblan virton de la ĉina laborista klaso. En la batala vivo de Li Juhe kaj la heroaj brilaj faroj de la tri generacioj de lia familio mi vidis la revolucionan heroismon de la ĉina popolo, kiu sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong timas nenian vivoferon kaj marŝas antaŭen unu sekvante alian por la venko de la revolucio."

Li diris ankaŭ: "Ju pli mi rigardas teatraĵojn radiantajn per la brilo de Maŭzedongpenso, des pli mi ŝatas ilin, ĉar ili senĉese donas al homoj edukon kaj kuraĝigon."

LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ FARIĜIS MASTROJ DE LA SCENEJO

Iun vesperon, amiko el sudorientazia lando vizitanta Ĉinion sidis ĉe radioricevilo kaj absorbite aŭskultis la revolucionan modernan pekinoperon *Sagaca Kapto de la Tigra Monto*. Li plurfoje diris al siaj ĉinaj amikoj, ke li tre ŝatas tiun teatraĵon. Kvankam li jam dufoje spektis ĝin en Ŝanhajo, tamen li ankoraŭ deziris pli multe ĝin rigardi. Li diris: "En tiu revolucia modela teatraĵo ne nur la arto estas perfekta sed ankaŭ la figuroj, pensoj kaj faroj de la herooj estas elstaraj kaj kortuŝaj. Mi amas la heroon Jang Zijong, en kiu mi vidis la noblan kvaliton de ĈPLA tutkore kaj tutanime servi al la popolo kaj la senkomparan potencon de popola milito gvidata de Prezidanto Maŭ. Kvankam mi rigardis tiun teatraĵon antaŭ tri monatoj, tamen ĝia viveca enhavo ĝis nun ankoraŭ profunde restas en mia kapo." Tion dirante li malfermis *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj diris: "Prezidanto Maŭ instruas: 'Niaj literaturo kaj arto estas por la popolamasoj, antaŭ ĉio por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kreitaj por kaj utiligataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.' Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ la ĉinaj literaturaj kaj artaj laborantoj surscenigis la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn." Li daŭrigis: "Sur la scenejo de nia lando la popolo estas netolereble distordita kaj ekpensante pri tio mi tuj pleniĝas de indigno." Ĉe tiu tempo li elprenis notlibron kaj montrante la transskribitan pecon da teksto de kanto de Jang Zijong: "La subprematoj tra la mondo havas ja similan sufer-konton, kaj volas venĝi sin, ho venĝi sin — kaj pro l' verŝita sang' postuli sangon!" li diris: "Jang Zijong eldiris tion, kio estas en la koroj de la subpremataj popoloj tra la mondo. Pro la kruela ekspluatado kaj subpremado de la usona imperiismo kaj japana reakciularo nia popolo nun vivas en granda sufero. Maŭzedongpenso direktas nian revolucion al venko. Nur se oni edukos, armos kaj organizos la popolon per Maŭzedongpenso, estos ebla la liberiĝo de nia popolo."



Vojo de Amikeco Malfermata de la Popoloj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio

EN la fino de oktobro de 1970 estis komencita la konstruado de la tanzania-zambia fervojo. La grandioza konstruado de la fervojo venkos ĉiajn malfacilojn kaj obstrukcojn kaj venke marŝos antaŭen sur la bazo de la amikeco inter la popoloj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio.

La fervojo kune konstruata de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio komenciĝas de Dar es Salaam, ĉefurbo de Tanzanio, trairas sudokcidenten la vastajn ebenejojn de Valo Kilombero, transiras eĝon de Makumbako, trapasas la krutan montpasejon Mbeya kaj poste eniras en la teritorion de Zambio, kie ĝi transiĝas super la torentan riveron Chambezi kaj serpentante laŭ montetoj iras al la mondfama zambia "kupra strio". La totala longeco de la fervojo estas ĉ. 1,900 kilometroj.

Konstruo de la tanzania-zambia fervojo estas longe dezirata de la popoloj de Tanzanio kaj Zambio kiuj estis longe sub la jugo de koloniismo en la pasinteco. Post la sendependiĝo, la registaroj kaj popoloj de Tanzanio kaj Zambio decidis elimini la koloniismajn fortojn kaj iri la vojon de sendependeco, memstareco, sinapogo sur propraj fortoj kaj disvolvo de la propra nacia ekonomio. La konstruado de la fervojo ja estas grava rimedo por tiu celo. Antaŭ tri jaroj, sub la rekta zorgado de Prezidanto Maŭ, Prezidanto Nyerere kaj Prezidanto Kaunda, la registaroj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio subskribis interkonsenton pri kons-


truado de la tanzania-zambia fervojo. Ekde tiam, elhakante vojon tra veproj, arbaroj kaj montaroj kaj peneme luktante, laboristoj, inĝenieroj kaj teknikistoj de la tri landoj venke faris prospektadon, projektadon kaj preparadon pri la konstruado.

La sama sufero en la pasinteco kaj la hodiaŭa komuna batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo kompakte ligis la laboristojn, inĝenierojn kaj teknikistojn de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio. Ili trapasis senhomajn montojn kaj sovaĝajn arbarojn, vagadis tra torentoj kaj marĉoj en kompakta kunlaboro kaj batala unuiĝo komponante kantojn de amikeco unun post alia.

La plej malfacila parto por la prospektado kaj projektado en la tuta linio estis la arco de Mlinba ĝis Makumbako en Tanzanio. Tie la montoj estas altaj kaj krutaj, valoj kaj ravinoj interkruĉiĝas, ĉie kreskas herbaroj kaj frekventas rabobestoj. Sed ĉia malfacilo ne povis subigi la laboristojn, inĝenierojn kaj teknikistojn de Tanzanio kaj Ĉinio en la batalo kontraŭ la naturo. Kunportante pezegajn drilmaŝinojn, akvon kaj manĝaĵon ili elhakis novajn vojojn en herbaro kaj arbaro. En soifo ili trinkis el sama botelo, en malsato prenis manĝaĵon el sama sako kaj en laciĝo aŭ malsano zorgis kaj helpis unu la alian. En senhoma regiono, kun mirinda energio kaj sentima spirito ili esplormezuris ses liniojn por la fervojo kaj antaŭ pluva sezono venke plenumis la prospekto-



*Ĉinaj konstruaj teknikistoj kaj tanzaniaj laboristoj
kune batalas en profundaj montoj kaj densaj arbaroj.*



Ĉina konstrua teknikisto edukas teknikistojn por Tanzanio.

radon de la parto kaj trovis relative kontentigan linion.

La popoloj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio estas fratoj kune dividantaj ĉiujn danĝerojn kaj estas veraj amikoj. Iufoje, ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj kaj tanzaniaj laboristoj transiris grandan Ruaha-riveron per sama bargo. Kiam la bargo atingis la rivermezon kie furiozas ondoj, je frapo de ondo kelkaj tanzaniaj amikoj falis en la riveron kaj estis malproksimen forportitaj. En tiu danĝera momento ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj, forgesante sian personan sekurecon, sin ĵetis en la riveron por savi la tanzaniajn fratojn. Post brava luktado kontraŭ la torento la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj savis ĉiujn tanzaniajn amikojn, dum iliaj propraj objektoj estis forportitaj de la fluo. Firme premante la manojn al la ĉinaj kamaradoj, la savitaj tanzaniaj fratoj diris

kun emocio: “Vi estas herooj timantaj nek mal-facilojn nek morton. Ni havas proverbon: ‘Amiko en malfeliĉo estas vera amiko’. Vi estas niaj veraj amikoj.”

Dum la kuna batalo de prospektorado kaj projektado, sinoferemo kaj helpemo de tanzaniaj kaj zambiaj fratoj profunde emociis la ĉinajn inĝenierojn kaj teknikistojn. Iun tagon, ĉinaj laborantoj kaj zambiaj fratoj kune faris topografian mezuradon en sovaĝejo. Subite el arbitaro el-saltis lupoj kaj ĵetiĝis kun ungegoj al iu ĉina kamarado. Kiam li luktis kontraŭ la lupoj, alrapidis iu zambia laboristo el inter proksima vepro kaj kriegante hakis per haktranĉilo la kapon al la lupoj kaj ĝin mortigis. Kiam la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj esprimis dankon al tiu zambia laboristo, li ridis serene: “Vi venis nin helpi; la lupoj provis ataki vin, tio signifas atakon al ni.

Ni neniel permesos al iu ajn subfosi la konstruadon de la fervojo. Niaj du popoloj devas venki koloniistojn same kiel ni mortigis la lupon.”

La prospektorado kaj projektado kaj prepara laboro pri la fervoja konstruado iras glate paŝon post paŝo kaj elvolviĝas ankaŭ buntaj floroj de amikeco. Ĉiuj laboroj de la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj ricevis varmajn zorgojn kaj subtenojn de la tanzaniaj kaj zambiaj loĝantoj proksime de la fervoja linio.

Apud iu montvilaĝo de Zambio, du ĉinaj laborantoj estis farantaj intensan prospektoradon en pluvego. Subite venis al ili maljuna virino.

Ŝi salutis ilin kaj invitis ilin ŝirmiĝi de pluvo en ŝia hejmo montrante proksiman kabanon. Kiam la ĉinaj kamaradoj danke rifuzis al ŝi, ŝi reiris kaj poste alportis vakstolojn kaj per ili kovris la ĉinajn kamaradojn kiel tenera patrino. El tiu afero la ĉinaj kamaradoj profunde sentis la varmon de amikeco.

Iun majan tagon de 1970, la preparado de la konstruado urĝe bezonis kalkŝtonojn. Sed de kie oni ilin akiros? La ĉinaj kamaradoj estis en brula maltrankviliĝo. Kiam tanzania laboristo Adibu sciigis pri tio, li tuj revenis al sia hejmo kaj diris tion al sia onklo Abudala. Sciiginte pri la urĝa bezono de la ĉinaj amikoj helpantaj en



Ĉinaj konstruaj teknikistoj kaj tanzaniaj laboristoj faras preparajn laborojn por la konstruado.

la konstruo de la tanzania-zambia fervojo, Abudala tuj iris al montoj, per tuta tago kolektis apud iu granda rivero ses ŝtonojn de malsamaj koloroj kaj senprokraste portis ilin al ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj. Li diris: “La tanzania kaj ĉina popoloj estas amikoj. Vi alvenis de la malproksima Ĉinio por helpi nin konstrui fervojon kaj disvolvi ekonomion, kio tre ĝojigis nin. En la pasinteco ni ne havis nian propran fervojon pro regado kaj ekspluatado de koloniistoj, sed hodiaŭ Prezidanto Maŭ sendis al ni ĉinajn inĝenierojn kaj teknikistojn, kaj ni nepre bone kunlaboros kun vi por ke la fervojo malfermiĝu al trafiko kiel eble plej frue.”

La profunda amikeco de la tri popoloj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio fondita sur la bazo de la batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo donis abundajn fruktojn. Antaŭ pli ol du jaroj, kiam la ĉina fervoja prospektora kaj projekta grupo forlasis Ifakaran de Tanzanio, reprezentanto de la lokaj kamparanoj donacis al ili du bananarbidojn dirante kun profunda amikeco: “Por memori

la amikecon inter la popoloj de Tanzanio kaj Ĉinio, plantu ilin ĉi tie; unu el ili simbolas la tanzanian popolon kaj la alia la ĉinan popolon. Post via foriro, la bananarboj memorigos al ni vin ĉinajn inĝenierojn kaj teknikistojn senditajn de Prezidanto Maŭ kaj la tagojn en kiuj ni amike vivis.” Poste, kiam la ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj revenis al Ifakara, la du bananarbidoj jam kreskis kaj donis fruktojn. En la komenco de 1970, kiam Prezidanto Nyerere venis al Ifakara por inspekti la preparadon por konstruado de la tanzania-zambia fervojo, ĉinaj inĝenieroj kaj teknikistoj regalis lin per bananoj simbolantaj la amikecon inter Ĉinio kaj Tanzanio. Prezidanto Nyerere kun plezuro manĝis la bananojn de amikeco.

Post la komenco de la konstruado de la tanzania-zambia fervojo, la giganta fervojkonstrua armeo el la laboristoj, inĝenieroj kaj teknikistoj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio marŝos al nova venko kun plena konvinko kaj per pli bravaj paŝoj laŭ la amikeca linio de ili kune prospektorita.



“Neniu pensis eĉ en sonĝo, ke ni dokistoj eniros en universitaton. Tion ni ŝuldas ja al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ!” Ĝojegis la dokistoj de la ŝanhaja haveno, kiam ili aŭdis, ke Gaŭ Agen baldaŭ en-iros en universitaton.

Dokistoj hurais kaj kuris por rigardi la ĝojan sciigon pri tiu ĉi afero.

La sciigo skribita sur ruĝa papero estis gluita sur iu maŝino. Antaŭ ĝi jam svarmis dokistoj. Por ĝin vidi, la poste-venantoj povis trovi por si lokon nur sur altejo. Ankaŭ sur apude staranta ŝipo estis multaj multaj homoj.

Sur la ĝoja sciigo estis skribita jeno:

“Eduki proletajn intelektulojn estas fundamenta laboro por fortikigi la diktaturon de la proletaro kaj

ĉefa tasko de socialismaj altaj lernejoj. Nun la teknologiaj alt-lernejoj en Pekino, Ŝanhajo kaj aliaj urboj akceptas novajn studentojn. Laŭ instruo de Prezidanto Maŭ kaj post serioza diskutado de niaj laboristaj kamaradoj, nia distrikto decidis sendi kamaradon Gaŭ Agen al Pekino por lerni en Kinghua-universitato. Kamarado Gaŭ Agen devas prepari sin por tuj sin anonci eĉ la koncerna institucio.”

Gaŭ Agen estas laboristo 25-jaraĝa kaj ano de la Komunista Partio de Ĉinio. Li laboras en la maŝin-riparejo eĉ la kajo. Li estas sindonema en laboro kaj multon faris por mekanikigo de ŝarĝo kaj malŝarĝo eĉ la kajo.

Antaŭ la ĝoja sciigo, oni rememoris la deziron pri lernado en universitato, kiun li havis antaŭ la

Granda Proletara Kultura Revolucio por pli-altigi sian labor-kapablon.

Sed tiam regis la reviziisma eduka linio. Multaj limigoj malebligis al laboristoj eniri en universitaton. Tial la deziro de Gaŭ Agen restis ĉiam nur deziro. Nur nun, en revolucio de edukado fine realiĝis lia deziro.

Baldaŭ venis ankaŭ kamarado Gaŭ Agen kune kun multaj aliaj kamaradoj. Ĉiuj ĝoje gratulis lin kaj varme premis al li la manon.

Leginte la ĝojan sciigon, Gaŭ Agen forte emociiĝis. Feliĉaj larmoj ruliĝis sur liaj vangoj. Li ekkriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Kaj tion kriis ankaŭ la aliaj laboristoj.

Dokisto Iras Studi en Universitato

Certe Triumfos la Heroa Gvineo Popolo

— Pri la defenda batalo de Conakry

EN la tria horo de la 22-a de novembro de 1970, la loĝantoj de la gvinea ĉefurbo Conakry estis subite vekitaj de intensa pafado. Oni baldaŭ sciigis de la gvinea radiostacio Voĉo de Revolucio: Conakry estas sub la surpriza atako de kelkcent dungitaj soldatoj subtenataj de la usona imperiismo kaj komandataj de portugala koloniistoj. La invadantaj dungitaj trupoj surbordiĝinte el dekelkaj militŝipoj, faris frenezan atakon en diversaj direktoj al gravaj distriktoj de Conakry kun la intenco murdi gvidantojn de Gvineo, renversi per unu bato la gvinean registaron kaj denove turni Gvineon, kiu persistas en batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo, en kolonion.

Pere de la radiostacio Voĉo de Revolucio, Prezidanto Sekou Toure tuj faris al la tuta lando solenan batalan alvokon postulante ke la tuta popolo, ĉu viroj ĉu virinoj, ĉu maljunaj ĉu junaj, prenu armilojn por defendi la patrion kaj komplete ekstermi la malamikojn. Prezidanto Sekou Toure diris: “Gvineo sin defendos ĝis la lasta homo.” La radiostacio senĉese brodkastis revoluciajn kantojn kaj batalajn sloganojn “La gvinea popolo leviĝu al batalo kaj antaŭen marŝu!” “Estas nenio alia pli kara ol la patrio! La popolo de Gvineo, leviĝu kaj komplete ekstermu la agresantojn! Venis la tago, kiam vi estas bezonataj por batali por la patrio!”

Respondante la alvokon de Prezidanto Sekou Toure, la heroa gvinea popolo tuj leviĝis brave por rezisti la agreson kaj donis pezan baton al la invadantoj. Per sia obstina batalo la gvinea popolo venke defendis ne nur la sendependecon kaj suverenecon de la granda Respubliko de Gvineo, sed ankaŭ la dignon de la popoloj de Afriko kaj la tuta mondo, donante brilan ekzemplon al la landoj batalantaj kontraŭ imperiismo.

Sub la ŝirmo de atakaerplanoj, la kelkcent portugala dungitaj soldatoj invadintaj de la maro surbordiĝis en la orienta, nordokcidenta kaj sudokci-

denta partoj de Conakry. Ili surprizis elektrostacion de Conakry, la loĝejon de Prezidanto Sekou Toure, kampadejojn de Boyro kaj Samory kaj la internacian aerodromon de Conakry; kaj samtempe, portugala militŝipoj sur la teritoria maro de Gvineo faris frenezan bombardon al Conakry por ŝirmi la atakon de la dungitaj trupoj.

La heroa gvinea popolo kun kontraŭimperiisma kaj kontraŭkoloniisma tradicio ne estis timigita de la surpriza atako kaj barbara hekatombo de la malamikoj. Sub la rekta komando de Prezidanto Sekou Toure, kun profunda malamo kontraŭ la malamikoj, la popoloj unuj post aliaj ĵetis sin en la batalon kontraŭ la malamikoj. Prezidanto Sekou Toure persone gvidis batalionon de respublika gardio por rezisti la frenezan atakon de grandnombraj dungitaj trupoj. Kuraĝigate de la slogano “preferi morti ol sklaviĝi”, la gvineaj armeoj brave batalis. Iu juna soldato kiu persistis sur sia batala posteno subite estis vundita je la kapo kaj falis. Sed kiam li rekonsciiĝis, li denove prenis la pafilon por daŭre batali kaj en unu spiro pafmortigis ses malamikojn. La trupo gardanta la aerodromon brave rezistis, frakasis malamikojn sturmintajn la aerodromon kaj kaptis nombron da malamikoj.

Post la tagiĝo, sub la peza bato de la gvineaj armeo kaj popolo, la agresantoj konsternite kuris al marbordo intencante reveni al la ŝipoj atendantaj sur la maro. Sed la gvinea armeo tranĉis ilian retiriĝan vojon per forta bombardo kaj la malamikoj fariĝis kvazaŭ bestoj en enfalilo.

En la tagmezo de la 22-a, sub la strikta kunagado de milicanoj, la Gvineo Popola Armeo faris furiozajn atakojn al la lokoj okupataj de la malamikoj. La batalo eksplodis unue en la kampadejo de Samory. Post pli-ol-duhora intensa batalo, la gvinea armeo komplete ekstermis la tieajn malamikojn. Ĉ. 2:30 ptm, la gvinea armeo komencis ataki kampadejon de Boyro. La tie okupantaj malamikoj obstine

rezistis. Disvolvante la heroisman spiriton de mal-timo al vivofero, la gvineaj armeanoj kaj milicanoj faris vidalvidan lukton kontraŭ la malamikoj, ekstermis plejparton kaj kaptis pli ol 20. ĉ. 4:30 ptm. La aliaj pli ol dek malamikoj sin retiris el la kampadejo al marbordo intencante forfuĝi per kaŭĉukaj boatoj. La gvineaj soldatoj kaj milicanoj persekutis en venko kaj komplete ekstermis ilin sur la marbordo. La elektrostacio okupita de la malamikoj estis rapide reprenita de helpaj trupoj de Gvineo venintaj de aliaj lokoj. En Conakry elektra provizado estis restarigita.

Post la intensa batalo de unu tago, kiam la nokto invadis la teron, la gvinea armeo kaj milico denove kontrolis la tutan ĉefurbon, komplete eksterminte la malamikojn surbordiĝintajn en grandaj grupoj.

Post brava batalo de kelkaj tagoj, la gvinea armeo kaj popolo akiris grandan venkon en rezisto kontraŭ agreso mortiginte pli ol 200 invadintajn dungitajn soldatojn kaj kaptinte grandan nombron. Ekde la 24-a de novembro, ĉio en Conakry reiris en ordon. Kuraĝigate de la batalaj sloganoj "kun hakilo en unu mano kaj pafilo en la alia" kaj "kun plumo en unu mano kaj pafilo en la alia", la laboristoj, funkciuloj, oficistoj, studentoj k. a. en la gvinea ĉefurbo kun alta singardemo ĉiam estas en preteco por doni ankoraŭ pli pezan baton al malamikoj kiuj aŭdacas refoje invadi.

En la heroa gvinea ĉefurbo baptita per milito, ĵurnalisto vizitis soldatojn de la popola armeo kaj

milicanojn partoprenintajn la defendan batalon de la ĉefurbo.

Multaj soldatoj de la Gvineo Popola Armeo kun fiero diris al la ĵurnalisto: Por ĉiam forpasis la tempo, en kiu imperiismo tiranis ĉie en la mondo. La gvinea popolo preferas morti ol sklaviĝi. Nevenkebla estas la vekiĝinta kaj unuiĝinta gvinea popolo!

Iu milicano kun pafilo en la manoj diris kun plena konvinko: "Imperiistoj malfermu la okulojn kaj rigardu! La gvinea popolo neniam demetos sian armilon. Gvineo neniam fariĝos paradizo de imperiistoj. Gvineo ĉiam estas tombejo de imperiismo kaj ĝiaj lakeoj!"

Post surbordiĝo la dungitaj trupoj barbare faris incendiadon kaj masakron. Multaj loĝantoj inkluzive de maljunuloj, virinoj kaj infanoj estis mortigitaj. Kiam la ĵurnalisto vizitis vunditojn en la hospitalo de Ignas Deen en Conakry, ili kun indigno akuzis la portugalajn agresantojn pri la damndaj krimoj. Iu vundito diris, ke imperiistoj barbare agesis multajn landojn en la mondo kaj masakris pacamajn loĝantojn, kaj eĉ li, 50-jara maljunulo, fariĝis viktimo de ilia agreso.

En Atlantiko impetas la ondoj kaj la gvinea popolo estas kun alta batalvolo. Sur la marbordo de Conakry ĉie oni povas vidi gvineajn trupojn kaj milicanojn ĉiam batalpretaj. Se la portugalaj dungitaj trupoj subtenataj de la usona imperiismo aŭdacas fari denove invadon, la tero de Gvineo kaj la fundo de la vasta Atlantiko estos ilia tombejo.



Norvega leganto E. O. skribis:

La deklaron de Prezidanto Maŭ Zedong je la 20-a de majo 1970 mi foje refoje legis kaj studis. Certe en la mondo hodiaŭ ekzistas bonega revolucia situacio. Tiu ĉi brila deklaro de Prezidanto Maŭ, mi firme kredas, havas kaj havos grandan signifon por la revolucia evoluo en la tuta mondo. Multaj popolanoj en Norvegio, kaj certe ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj, nun sekvas la admonon "Popoloj de la tuta mondo, unuiĝu kaj venku la

usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn!"

Mi nun partoprenas en studrondo pri Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso. La marksism-leninisma movado en nia lando estas en progreso.

GFR-a leganto A. L. skribis:

La artikoloj kaj bildoj pri la diligentaj gelaboristoj tre plaĉas al mi. Oni povas vidi, ke ĉiu estas fervora ĉe sia laboro. Kaj kial? Ĉar ili scias, ke ilia laboro servas al la tuta popolo sed ne al granda kapitalisto, al ekspluatanto. Al tio kunhelpas certe la informado de geaktivuloj per Maŭzedongpenso.

Honeste mi devas konfesi, ke ĉiuj rubrikaj interesas kaj plaĉas al

mi, ĉar ili ĝenerale montras la diligenton, laboremon kaj la inteligentecon de popolo, kiu sin liberigis el subpremo, mizero kaj sufero.

Mi deziras al la tuta ĉina popolo pacon kaj bonstaton por ĉiam.

Mi tre ĝojas kaj ŝatas, ke ankaŭ via granda Prezidanto Maŭ scias la valoron de la internacia lingvo Esperanto.

Dana leganto F. M. skribis:

Via gazeto donas bildon de celkonscia Ĉinio. Ĝojige estas, ke la homoj kun pli alta scienca eduko, pli da "intelektto" ree iras inter la laboristojn kaj kamparanojn kaj tiamaniere ne perdas la kontakton kun ili. Ili lernas resti popolanoj, kaj la vojo estas la malpliigo de la "mi".



La japanaj popoloj manifestacias tenante tabulojn kun sloganoj "Firma opono kontraŭ la revivigo de la japana militarismo" kaj aliaj.

LA 25-an de novembro, 1970, la japanaj reakciuloj, post zorga aranĝado, surscenigis la t. n. "Miŝima-incidenton" en Tokio, en kiu la dekstrulo kaj faŝisto Jukio Miŝima memmortigis en la reakcia samurajisma maniero, por agiti la japanan armeon al ŝtatrenverso kaj tiel akceli militarismigon. La reakcia Sato-registaro nun utiligas tiun incidenton por energie krei publikan opinion favoran al ĝia pli rapida irado laŭ la vojo de revivigo de militarismo. Tio ĉi estas alia fera atesto pri la revivigo de la japana militarismo fare de Sato-registaro.

La Asocio de la Ŝildo fondita de la dekstrulo kaj faŝisto Jukio Miŝima estas militarisma organizo, elkovita rekte de Sato-registaro. La plenmano da bandanoj sub Miŝima estas trejnitaj de la "Memdefendaj Trupoj". Je la 25-a de novembro, la ĉefo de tiu ĉi dekstra bando Jukio Miŝima iris al la komandejo de la Orienta Armeo de la japana "Tera Memdefenda Trupo" en Iĉigaja, Tokio, kaj, sub permeso de Kanetoŝi Masuda, komandanto de la Orienta Armeo, faris historiajn kriaĉojn antaŭ pli ol 1,000 membroj de la "Memdefendaj Trupoj". Li kriaĉis por revizii la japanan konstitucion kaj fari la "Memdefendajn Trupojn" vera "nacia armeo" de Japanio, por tiel "defendi la japanajn historion, kulturon kaj tradicion kun tennoo kiel la centro", ktp.

La kriaĉoj de Miŝima senmaskigis la insidajn celojn de la plenmano da japanaj militaristoj restarigi la sistemon de faŝisma diktatoreco kun tennoo kiel la centro kaj antaŭenpuŝi la politikon de agreso

NUGIANG:

Vero pri "Miŝima- incidento"

kaj milito ankoraŭ pli furioze. Post la kriaĉoj Miŝima sin mortigis harakire.

La "Miŝima-incidento" okazis ĝuste en la tempo, kiam la japana registaro okazigis eksterordinaran sesion de la Dieto (parlamento), en kiu tennoo faris paroladon kaj ĉefministro Eisaku Sato kriaĉis, ke Japanio devas "protekti siajn naciajn interesojn kaj kontribui al la paco en la Malproksima Oriento". La rabia ago de Miŝima en agordo kun la krioj de Sato montras, ke la japanaj reakciuloj estas utiligantaj la dekstrajn faŝismajn fortojn por antaŭenpuŝi sian kontraŭrevolucion politikan linion de militarismo ankoraŭ pli rapide. La "Miŝima-incidento" donis plaŭdan vangfrapon al Nixon, Sato kaj similaj, kiuj neadas la reviviĝon de la japana militarismo.

La bojado de Miŝima, ĉefo de la Asocio de la Ŝildo, kaj la militarismaj kriaĉoj de Sato kaj similaj estas tute samaj. La 2-an de julio, 1970, en sia longa parolado sur la forumo de membroj de la "Societo por Studo de Ŝtata Politiko", Jasuhiro Nakasone diris senskrupule incitante militarisman histerion: "En la Japana-Ĉina Milito de 1894, nelonge post la okupo de Liaŭdong-duoninsulo, ni estis ordonitaj redoni ĝin. Tiutempe, la japanaj civitanoj alprenis la sloganon 'daŭrigi decidemon kaj persistemon'. Poste, en la Japana-Rusa Milito ni atingis nian celon." Ĉu tiuj vortoj ne signifas la samon de la postulo de Miŝima por "restarigi la verajn trajtojn de Japanio"? Ĉu tio ne estas malkaŝa kriaĉo de la japanaj militaristoj por reokupi la lokojn, kiujn

ili iam kaptis por si? Ĉu tio ne servas ĝuste por atingi tiun kriman celon, ke la reakcia Sato-registaro publikigis la "Nacidefendan Blankan Libron" kaj la Kvaran Programon por Milita Konstruado rabie trumpetante por arma ekspansio kaj milita preparo?

Ridinde estas, ke post la "Miŝima-incidento", Sato, Nakasone kaj similaj unuflanke mallerte klopodis forviŝi la rilatojn inter la Asocio de la Ŝildo kaj la "Memdefendaj Trupoj" kaj aliflanke hipokrite asertis, ke Miŝima "atencis leĝon kaj ordon", penante fari impreson kvazaŭ nur Miŝima kaj similaj estas militaristoj, kun kiuj la nunaj militaj kaj politikaj ĉefoj havas nenian rilaton. Jen, ju pli ili klopodas kovri la veron, des pli ili ĝin malkaŝas.

Fakte, Sato, Nakasone kaj similaj estas ĝuste la ĉefoj kaj ricelantoj de la dekstraj militarismaj organizoj de Japanio. Kiel ĉiuj scias, militarismaj organizoj de diversaj specoj estas starigitaj tra la tuta Japanio sub la nutrado de la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Tiuj dekstraj organizoj havas sennombrajn rilatojn kun la reakcia Sato-registaro kaj la Liberala Demokratia Partio. Iujn el ili oni gardas ekde la tempo antaŭ la milito, dum aliaj estas formitaj el malnovaj militistoj. Multaj militarismaj organizoj fakte jam fariĝis la rezervo de la japanaj polico kaj trupoj. La japanaj reakciuloj ĉiam prenas tiujn reakciajn fortojn kiel gravan konsistigan parton de la japanaj militarismaj fortoj. Ĉiuj ĉefoj de tiuj organizoj estas malnovaj faŝistaj militistoj aŭ ĉefoj de speciala sekreta servo. Ekzemple, Joŝio Kodama, fifama ĉefo de specialaj sekretaj agentoj, estas nun la ĉefo de la kompare granda dekstra organizo Asocio por Studo de la Penso de Junularo. La Asocio de la Ŝildo, organizita de Jukio Miŝima estas nenio alia ol ĉelo de la japana militarismo reprezentata de Sato, Nakasone kaj aliaj. Ĝuste kiel montris la direktoro de la Buroo de Ĝeneralaj Aferoj de la Japana Socialista Partio, pridemandante Sato-registaron pri ĝia respondeco en la "Miŝima-incidento", ke "la politika sinteno de Sato-kabineto, kiu apogas la diversajn reakciajn tendencojn, estas tre diskutinda, kaj ĝi portas tre grandan respondecon". Je la 27-a de novembro, la direktoro de la Internacia Buroo de la Japana Socialista Partio diris al eksterlandaj ĵurnalistoj, ke Sato-registaro estas reviviganta militarismon en Japanio.

Ĝuste pro tio, ke Miŝima vendis sin por distrumpeti militarismon, la japanaj reakciuloj energie ŝminkis la "Miŝima-incidenton". La japana ĉefministro Eisaku Sato malkaŝe faris la iniciaton de simpatiesprimo al la ago de la cent-pocenta militaristo Jukio Miŝima, babilaĉante ke "estas tre bedaŭ-

rinde ke tia elstara verkisto mortis". Papage imitante Eisaku Sato, reakciaj ĵurnaloj kaj dungitaj verkistoj de la japana burĝaro plengorge laŭdis la militariston Miŝima, dirante ke "tio estas ago de estetiko", farita pro "zorgo pri la sorto de la lando" kaj por "plifortigi kaj stimuli la Memdefendajn Fortojn" kaj "revivigi la samurajisman spiriton", ktp. ktp.

Certaj signoj montras, ke la japanaj militaristoj nun klopodas utiligi la "Miŝima-incidenton" por pliintensigi la subpremadon al la revoluciaj movadoj de la popolo kaj aktive prepari agresajn militojn eksterlande. Post la incidento, Masuo Araki, prezidanto de la Landa Komisiono de Publika Sekuro de Sato-registaro, kriaĉis ke li jam instrukiis al la policaj aŭtoritatoj tra la lando fari ĝisfundan esploron pri la dekstraj kaj maldekstraj movadoj. Ankaŭ Nakasone, la direktoro de la "Defenda Agentejo", kriis, ke Japanio devas sufoki minacojn de perforto ĉu de la maldekstruloj aŭ de la dekstruloj. Estas tre evidente, ke ĉe tiuj dekstraj kaj faŝismaj elementoj kiel Araki kaj Nakasone la parolo pri elimino de dekstruloj estas kompreneble nur trompo, kaj ilia vera celo estas ekstermi la maldekstrulojn. Kion ili vere intencas, estas nenio alia ol kapti la ŝancon por subpremi la popolajn movadojn en Japanio, kiuj fariĝas ĉiam pli malkontentaj pri la antaŭenpuŝo de militarisma politiko, kaj tiel povi libere fari agresojn. Tio ne povas ne revoki en nian memoron la "Incidenton de la 26-a de Februaro" de 1936. Tiutempe, la japanaj militarismaj fortoj subinstigis grupon da junaj faŝismaj oficiroj fari ŝtatrenverson en Tokio por faciligi pli furiozan antaŭenpuŝon de la politiko de militarismigo. Pretekstante subpremon al tiu ŝtatrenverso, la japanaj militistoj de la juna generacio starigis faŝisman militan diktatorecon kaj tuj poste estis komencita la plenampleksa agreso kontraŭ Ĉinio en 1937.

La "Miŝima-incidento" montras, ke Sato-registaro de Japanio, kiu ĉiam sekvas la usonan imperiismon kaj estas malamiko de la ĉina kaj aliaj aziaj popoloj, alvizaĝas seriozajn politikajn kaj ekonomiajn krizojn. Ĝi intrigas iri la malnovan vojon de Hideki Toĝo por fari la antaŭmortan baraktadon per agresaj militoj. Tamen mondrenversaj ŝanĝoj jam okazis en Japanio kaj Azio kompare kun la tempo antaŭ 30 jaroj kaj la tuta revolucia situacio estas nun bonega. Se Sato-registaro, kiu intense revivigas la japanan militarismon, aŭdacos eksplodigi agresajn militojn, la japana popolo, kiu konsciiĝis pli ol iam ajn antaŭe, batalos ŝultro ĉe ŝultro kun la aliaj aziaj popoloj kaj fine ekstermos la militarismon!



La japanaj popolanoj manifestacias tenante tabulojn kun sloganoj "Firma opono kontraŭ la revivigo de la japana militarismo" kaj aliaj.

LA 25-an de novembro, 1970, la japanaj reakciuloj, post zorga aranĝado, surscenigis la t. n. "Miŝima-incidenton" en Tokio, en kiu la dekstrulo kaj faŝisto Jukio Miŝima memmortigis en la reaktia samurajisma maniero, por agiti la japanan armeon al ŝtatrenverso kaj tiel akceli militarismigon. La reaktia Sato-registaro nun utiligas tiun incidenton por energie krei publikan opinion favoran al ĝia pli rapida irado laŭ la vojo de revivigo de militarismo. Tio ĉi estas alia fera atesto pri la revivigo de la japana militarismo fare de Sato-registaro.

La Asocio de la Ŝildo fondita de la dekstrulo kaj faŝisto Jukio Miŝima estas militarisma organizo, elkovita rekte de Sato-registaro. La plenmano da bandanoj sub Miŝima estas trejnitaj de la "Memdefendaj Trupoj". Je la 25-a de novembro, la ĉefo de tiu ĉi dekstra bando Jukio Miŝima iris al la komandejo de la Orienta Armeo de la japana "Tera Memdefenda Trupo" en Iĉigaja, Tokio, kaj, sub permeso de Kanetoŝi Masuda, komandanto de la Orienta Armeo, faris histeriajn kriaĉojn antaŭ pli ol 1,000 membroj de la "Memdefendaj Trupoj". Li kriaĉis por revizii la japanan konstitucion kaj fari la "Memdefendajn Trupojn" vera "nacia armeo" de Japanio, por tiel "defendi la japanajn historion, kulturon kaj tradicion kun tennoo kiel la centro", ktp.

La kriaĉoj de Miŝima senmaskigis la insidajn celojn de la plenmano da japanaj militaristoj restarigi la sistemon de faŝisma diktatoreco kun tennoo kiel la centro kaj antaŭenpuŝi la politikon de agreso

NUGIANG:

Vero pri "Miŝima- incidento"

kaj milito ankoraŭ pli furioze. Post la kriaĉoj Miŝima sin mortigis harakire.

La "Miŝima-incidento" okazis ĝuste en la tempo, kiam la japana registaro okazigis eksterordinaran sesion de la Dieto (parlamento), en kiu tennoo faris paroladon kaj ĉefministro Eisaku Sato kriaĉis, ke Japanio devas "protekti siajn naciajn interesojn kaj kontribui al la paco en la Malproksima Oriento". La rabia ago de Miŝima en agordo kun la krioj de Sato montras, ke la japanaj reakciuloj estas utiligantaj la dekstrajn faŝismajn fortojn por antaŭenpuŝi sian kontraŭrevolucion politikan linion de militarismo ankoraŭ pli rapide. La "Miŝima-incidento" donis plaŭdan vangfrapon al Nixon, Sato kaj similaj, kiuj neadas la reviviĝon de la japana militarismo.

La bojado de Miŝima, ĉefo de la Asocio de la Ŝildo, kaj la militarismaj kriaĉoj de Sato kaj similaj estas tute samaj. La 2-an de julio, 1970, en sia longa parolado sur la forumo de membroj de la "Societo por Studo de Ŝtata Politiko", Jasuhiro Nakasone diris senskrupule incitante militarisman histerion: "En la Japana-Ĉina Milito de 1894, nelonge post la okupo de Liaŭdong-duoninsulo, ni estis ordonitaj redoni ĝin. Tiutempe, la japanaj civitanoj alprenis la sloganon 'daŭrigi decidemon kaj persistemon'. Poste, en la Japana-Rusa Milito ni atingis nian celon." Ĉu tiuj vortoj ne signifas la samon de la postulo de Miŝima por "restarigi la verajn trajtojn de Japanio"? Ĉu tio ne estas malkaŝa krio de la japanaj militaristoj por reokupi la lokojn, kiujn

ili iam kaptis por si? Ĉu tio ne servas ĝuste por atingi tiun kriman celon, ke la reakcia Sato-registaro publikigis la “Nacidefendan Blankan Libron” kaj la Kvaran Programon por Milita Konstruado rabie trumpetante por arma ekspansio kaj milita preparo?

Ridinde estas, ke post la “Miŝima-incidento”, Sato, Nakasone kaj similaj unuflanke mallerte klopodis forviŝi la rilatojn inter la Asocio de la Ŝildo kaj la “Memdefendaj Trupoj” kaj aliflanke hipokrite asertis, ke Miŝima “atencis leĝon kaj ordon”, penante fari impreson kvazaŭ nur Miŝima kaj similaj estas militaristoj, kun kiuj la nunaj militaj kaj politikaj ĉefoj havas nenian rilaton. Jen, ju pli ili klopodas kovri la veron, des pli ili ĝin malkaŝas.

Fakte, Sato, Nakasone kaj similaj estas ĝuste la ĉefoj kaj ricelantoj de la dekstraj militarismaj organizoj de Japanio. Kiel ĉiuj scias, militarismaj organizoj de diversaj specoj estas starigitaj tra la tuta Japanio sub la nutrado de la usonaj kaj japanaj reakciuloj. Tiuj dekstraj organizoj havas sennombrajn rilatojn kun la reakcia Sato-registaro kaj la Liberala Demokratia Partio. Iujn el ili oni gardas ekde la tempo antaŭ la milito, dum aliaj estas formitaj el malnovaj militistoj. Multaj militarismaj organizoj fakte jam fariĝis la rezervo de la japanaj polico kaj trupoj. La japanaj reakciuloj ĉiam prenas tiujn reakciajn fortojn kiel gravan konsistigan parton de la japanaj militarismaj fortoj. Ĉiuj ĉefoj de tiuj organizoj estas malnovaj faŝistaj militistoj aŭ ĉefoj de speciala sekreta servo. Ekzemple, Joŝio Kodama, fifama ĉefo de specialaj sekretaj agentoj, estas nun la ĉefo de la kompare granda dekstra organizo Asocio por Studo de la Penso de Junularo. La Asocio de la Ŝildo, organizita de Jukio Miŝima estas nenio alia ol ĉelo de la japana militarismo reprezentata de Sato, Nakasone kaj aliaj. Ĝuste kiel montris la direktoro de la Buroo de Ĝeneralaj Aferoj de la Japana Socialista Partio, pridemandante Sato-registaron pri ĝia respondeco en la “Miŝima-incidento”, ke “la politika sinteno de Sato-kabineto, kiu apogas la diversajn reakciajn tendencojn, estas tre diskutinda, kaj ĝi portas tre grandan respondecon”. Je la 27-a de novembro, la direktoro de la Internacia Buroo de la Japana Socialista Partio diris al eksterlandaj ĵurnalistoj, ke Sato-registaro estas reviviganta militarismon en Japanio.

Ĝuste pro tio, ke Miŝima vendis sin por distrumpeti militarismon, la japanaj reakciuloj energie ŝminkis la “Miŝima-incidenton”. La japana ĉefministro Eisaku Sato malkaŝe faris la iniciaton de simpatiesprimo al la ago de la cent-pocenta militaristo Jukio Miŝima, babilaĉante ke “estas tre bedaŭ-

rinde ke tia elstara verkisto mortis”. Papage imitante Eisaku Sato, reakciaj ĵurnaloj kaj dungitaj verkistoj de la japana burĝaro plengorĝe laŭdis la militariston Miŝima, dirante ke “tio estas ago de estetiko”, farita pro “zorgo pri la sorto de la lando” kaj por “plifortigi kaj stimuli la Memdefendajn Fortojn” kaj “revivigi la samurajisman spiriton”, ktp. ktp.

Certaj signoj montras, ke la japanaj militaristoj nun klopodas utiligi la “Miŝima-incidenton” por pliintensigi la subpremadon al la revoluciaj movadoj de la popolo kaj aktive prepari agresajn militojn eksterlande. Post la incidento, Masuo Araki, prezidanto de la Landa Komisiono de Publika Sekuro de Sato-registaro, kriaĉis ke li jam instrukciis al la policaj aŭtoritatoj tra la lando fari ĝisfundan esploron pri la dekstraj kaj maldekstraj movadoj. Ankaŭ Nakasone, la direktoro de la “Defenda Agentejo”, kriis, ke Japanio devas sufoki minacojn de perforto ĉu de la maldekstruloj aŭ de la dekstruloj. Estas tre evidente, ke ĉe tiuj dekstraj kaj faŝismaj elementoj kiel Araki kaj Nakasone la parolo pri elimino de dekstruloj estas kompreneble nur trompo, kaj ilia vera celo estas ekstermi la maldekstrulojn. Kion ili vere intencas, estas nenio alia ol kapti la ŝancon por subpremi la popolajn movadojn en Japanio, kiuj fariĝas ĉiam pli malkontentaj pri la antaŭenpuŝo de militarisma politiko, kaj tiel povi libere fari agresojn. Tio ne povas ne revoki en nian memoron la “Incidenton de la 26-a de Februaro” de 1936. Tiutempe, la japanaj militarismaj fortoj subinstigis grupon da junaj faŝismaj oficiroj fari ŝtatrenverson en Tokio por faciligi pli furiozan antaŭenpuŝon de la politiko de militarismo. Pretekstante subpremon al tiu ŝtatrenverso, la japanaj militistoj de la juna generacio starigis faŝisman militan diktatorecon kaj tuj poste estis komencita la plenampleksa agreso kontraŭ Ĉinio en 1937.

La “Miŝima-incidento” montras, ke Sato-registaro de Japanio, kiu ĉiam sekvas la usonan imperiismon kaj estas malamiko de la ĉina kaj aliaj aziaj popoloj, alvizaĝas seriozajn politikajn kaj ekonomiajn krizojn. Ĝi intrigas iri la malnovan vojon de Hideki Toĝo por fari la antaŭmortan baraktadon per agresaj militoj. Tamen mondrenversaj ŝanĝoj jam okazis en Japanio kaj Azio kompare kun la tempo antaŭ 30 jaroj kaj la tuta revolucia situacio estas nun bonega. Se Sato-registaro, kiu intense revivigas la japanan militarismon, aŭdacos eksplo digi agresajn militojn, la japana popolo, kiu konsciiĝis pli ol iam ajn antaŭe, batalos ŝultro ĉe ŝultro kun la aliaj aziaj popoloj kaj fine ekstermos la militarismon!

Sur la Kovrilo:

Dum la periodo de la Kontraŭ-japana Rezistmilito, kunagante kun la propra armeo de la laboristoj kaj kamparanoj, la vastaj amasoj de milicianoj ĉe la lago Bajjangdian de Hebej-provinco multe ekstermis kaj forte batis la malamikojn embuskante en densaj fragmitejoj; la revolucia tradicio herediĝas de generacio al generacio; nun, tenante en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ "altigi singardemon, defendi la patrolandon" la juna generacio de milicianoj estas ĉiam preta ekstermi invadantajn malamikojn.

Sur la Dorskovrilo:

La malriĉkamparanoj kaj mal-supera mezkamparanoj de Ĝin-an-brigado de Linmu-komunumo, Lin-an-gubernio, Ĝegiang-provinco, disvolvis la amasan movadon de "lerno de Daĝaj en agrikulturo" kaj hakas montojn por konstrui irigacian kanalon en la spirito de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj.

EL POPOLA ĈINIO 人民中国报

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 2 (151) 1971

Ĉefa Enhavo

Generalo Agha Mohammad Yahya Khan, Prezidanto de Pakistano, Vizitis Ĉinion

Fiasko de la Malamika Politiko de la Usona Imperiismo kontraŭ Ĉinio

Batalo por Jungi Hajhe-riveron

Navigebligis la Danĝerplena Vugiang-rivero

Pomua Grenprodukto de Hingvu-brigado Atingis Mil Ĝinojn

Kondukanto de Juehi-brigado

Skoltoj de Subtera Trezoro

Printempo en Malnova Urbo

Mi Amas la Grandajn Arbarojn de Nia Patrolando

Meteorologia Observado por la Revolucio

Nova Disvolviĝo de Tekniko en Replanto de Derompitaj Membroj

Fervojkonstrua Batalanto Hiang Vangkun

Nova Fizionomio de Liugoŭ-stacio

Fremdlandaj Amikoj Varme Laŭdas la Revoluciajn Modelajn Teatraĵojn


Vojo de Amikeco Malfermata de la Popoloj de Ĉinio, Tanzanio kaj Zambio

Certe Triumfos la Heroa Gvinea Popolo

Vero pri "Miŝima-incidento"

Triumfaj Novajoj Venas de la Industria Fronto


La laboristoj kaj teknikistoj de la Ŝanhaja Instituto pri la Elektrona Optiko mem projektis kaj sukcese provfaris, per materialoj fabrikitaj de nia lando, grandan elektronan mikroskopon kun grandigpovo de 400,000 fojoj. Kun vidiga kapablo de pli ol 5 A, ĝi kreis favoran kondiĉon por la scienca esplora laboro de nia lando.






La revoluciaj laboristoj de diversaj naciecoj de la Traktora Fabriko "Oktoebro" de Hingiang plenumis la produktan planon de traktoroj. Jen atendas transportadon al la kamparo nombro da traktoroj "Ruĝa Oktoebro" Tipo 40 projektitaj kaj fabrikitaj de ili mem.





La unua ultragranda vertikala ilmaŝino projektita de nia lando estis sukcese provfarita de la Vuhan-a Fabriko de Grandaj Ilmaŝinoj. Jen laboristoj varme celebras ĝian produkton.

Post la funkciado ilmaŝino kun ŝtona korpo fabrikita de laboristoj de la Ŝanhaja Ruĝstela Mezurila Fabriko pruvigis tre taŭga por sia celo. Dank' al uzo de ŝtono, oni ŝparis por la ŝtato grandan kvanton da ŝtalo.



Diversnaciecaj revoluciaj laboristoj de la Baŭtoŭ-a Ferŝtala Kompanio sukcesis translokigi je la distanco de 283 metroj kaj instali grandan tralavan turon pli ol 220 tunojn pezan en maniero de vertikala tuto, kaj tiel faris novan kontribuon por la ŝtato en pliprodukto de fero kaj ŝtalo.

